


# ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



N-ro 648 (11)  
Novembro 1959



*Lamenhof-Varo*

**Universala  
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun  
U.N.E.S.C.O.)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino :  
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto  
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA  
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2,  
Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Girkonto : 378964  
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi respektive  
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ  
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,  
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represafon  
al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro  
12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld 1/2 paĝo 64,— gld 1/4 paĝo 32,— gld  
1/8 paĝo 16,— gld 1/16 paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu  
duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37,  
Torino.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi,  
Okayama, Japanujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,  
London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere  
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,  
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South  
Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo,  
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca  
3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,  
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAGA BILDO PREZEN  
La urbodomo de Bruselo, la Kongres

## Enhavo

Forigu la Barojn . . . . .  
Utiligo de la Fondajo-Zamenhof . . . . .  
Ora festo de Teo Jung . . . . .  
Esperantologio . . . . .  
Esperanto servis por japana filmo  
Raportoj . . . . .  
S.A.T.-kongreso . . . . .

Rubrikoj :

Okaze de la Zamenhof-jaro . . . . .  
45-a U.K. . . . .  
CED . . . . .  
La juna Vivo . . . . .  
Tra la Mondo . . . . .  
Esperantista Vivo & Nekrologo  
Belartaj konkursoj . . . . .  
Novaj Libroj . . . . .  
La internaciaj konkursoj . . . . .  
Oficiala Informilo . . . . .

Manuskriptoj por "Esperanto" estu  
redakcio en du ekzempleroj. Ili d  
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni  
unu flanko de la papero (prefere  
A4), kun interlinia spaco kaj kun tr  
maldekstre por redakciaj instrukci  
Supersignitaj literoj devas havi la  
signojn, se necese permane aldon  
manuskriptojn oni resendas nur  
aŭ respondkupono.

**OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO.**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

# Forigu la Barojn

## La Uiligo de la Fondaĵo-Zamenhof

La ĉiunomataj informoj pri la stato de la Fondaĵo-Zamenhof vekis ĉe kelkaj membroj la opinion ke la korektita sumo certe jam sufiĉas por la celoj, ĉe aliaj la demandojn, kia fakte estas farata per la bonhavo de tiu fondaĵo. Al tio ni volonte respondas.

La Baza Programo de la Arangoj okaze de la Zamenhof-jaro, konata al ĉiu leganto per publikigo sur p. 187 de la decembra numero 1958 de "Esperanto", sur pp. 16-18 de Jarlibro I 1959 kaj sur p. 5 de la jubilea Zamenhof-broŝuro, estas paŝon post paŝo plenumata. Preĉipe la elspozoj por realigi la punktojn 2, 3, 4, 5, 15 kaj 16 de tiu programo devas esti kovrataj de la Zamenhof-Fondaĵo.

La dokumento, celita en p. 2 estas en Esperanto eldonita, 12-paĝa, en belaj formo. Ricevis ĝin senpage ĉiuj indijviduaj membroj de U.E.A. en 1959, Similan 8-paĝan broŝuron eldonis U.E.A. en angla kaj franca lingvoj kaj sendis al ĉiuj da internaciaj instancoj kaj organizacioj.

Ampleksaj serioj de dokumentoj kaj artikoloj, laŭ punktoj 3 kaj 4, estas en Esperanto kaj en angla lingvo larĝe dissendataj en la mondon. Kelkaj el la dokumentoj, nome RDC/6-1, RDC/6-2 kaj RDC/6-3, estas aparte bele eldonitaj kun presita kovrililo. Informoj laŭ p. 5 estas ĝis nun aperintaj en 17 bibliografioj, pri ĉiu parolo p. 15, estas sinsekvaj plurpaĝaj cikuloj. La prilaborata kaj eldonita. La memoroj kaj ĝiunavarkoj eldonitaj laŭ p. 16, jam estas ĉie en la mondo uzataj. Krom ĉio ĉi, la revuo "Esperanto" aperadas regule kun 20 paĝoj ankoraŭ kun 16, verkitaj artikoloj kaj informoj pri memorigitaj aranĝoj en diversaj landoj.

La materialoj, laboroj, preskoscioj, afankoj por ĉio menciita, estas pagataj el la Fondaĵo-Zamenhof. Krome, estas subvenciacia el la Fondaĵo-Zamenhof kiel speciala agado en tiu ĉi jaro, la laboro de S-ino Handebine en Hindujo.

Laŭ la nuna situacio, post ĉiuj ĉi elspozoj ne ekzistas sufiĉe da mono en la Fondaĵo-Zamenhof por eldoni la planitan Memorlibron laŭ p. 4, kin tamen nepre devos aperi kiel monumemento al la aŭtoro de Esperanto en tiu ĉi jubilea jaro. Laŭ provizoraj kalkuloj mankas ĉ. 4000 gid. Tial ni petas, ke neniu pensu, ke jam estas plena la kazo de la Zamenhof-Fondaĵo, sed ke ĉiu duntirigu la kontribucion same malavare kiel ĝis nun kaj ke multaj novaj donacintoj ekagru!

Unu el la fundamentaj motivoj por esperantisto estas la forigado de baroj inter nacioj, inter rasoj, inter landoj kaj mondpartoj. Kredante, ke la lingva barilo estas granda malhelpilo al interkomprenigado, li anĝas al la Internacia Lingvo. Tial la movado devos kapti, dum la venontaj sep jaroj, unikajn okazon por montri al la homaro kaj al la fakuloj pri internaciaj aferoj, ne nur, ke ni prave atribuas grandan rolon al lingvaj problemoj, sed ankaŭ, ke Esperanto estas praktika kaj floranta solvo. Mi aludas al la Granda Projekto de UNESKO pri Recepta Aprecado de Okcidentaj kaj Orientaj Kulturaj Valoroj. Jam dum tri jaroj UNESKO kaj la diversaj registaroj kaj neregistaroj aliĝintaj al ĝi klopodis pri la grandioza dekjara plano por apudigo spirita de la du duonsteroj de la mondo. Ni plenumu la proprajn celojn kaj samtempe pruvu la valoron de Esperanto kiel kultura ilo farante nian parton.

Kiel raportite en la septembra numero de Esperanto, UEA jam vigle okupas sin pri la problemo, planas eldoni, planas libroservojn kaj pluraĵajn aliajn aferojn kun la celo helpi al ĉi tiu projekto. Jam niaj ano, S-ino Worcester, S-ino Handebine, S-ro Sekelj, D-ro Kuwahara, S-ro Choi (prezidanto de Chungjuo Universitato) reciproke vizitas Eŭropon kaj Azion, prelegante kaj instruante pri siaj landoj kaj kulturoj. Komprenibile ankaŭ multaj aliaj faras tion, sed mankas spaco por rakonti ĉion. Jam la somera lernejo en Frostavallen dediĉis sin al ĉi tiu temo. Jam oni planas eldoni Ĉinan Antologion, por menciĝi nur ekzemplojn de la okazanta agado.

Tamen necesas, ke ni ĉiuj helpu en la laboro por ĉi tiu projekto. Ĉiu homo povos partopreni korespondadon inter oriento kaj okcidento, ĉiu grupo povos aranĝi interanĝon de prelegoj, bildoj kaj leroj kun la alia duonstero; ĉiu gazeto, ĉu nacia, ĉu pli vasta, povas zorgi ke estu ekvilibrado de la enhavo el diversaj kontinentoj. Preĉipe la gazetoj de la naciaj asocioj povas aranĝi pri interanĝo de materialoj, kaj mi forte petas al ĉiu, kin povas helpi en tiaj aferoj, fari tion. Vi helpos duoble al la movado, plenumante la celojn de la lingvo kaj disvastigante scion pri ĝia utilo.

Unu lasta peto, ne faru ĉion sekrete. Grupoj aŭ gazetoj kiuj planas agadon en la senco de ĉi tiu artikolo, nepre informu al la sekretario de la tucele en Mainz starigita komisiono, Norman R. Smith, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W. 5, Britujo, por ke la faktoj estu plusendataj al UNESKO.

(Detalojn vidu sur p. 200)

# APEROS EPOKARA ELDONAĴO:

## Memorlibro pri la Zamenhof-jaro

N. R. S.

## Ora festo de Teo Jung

En tiu ĉi jaro de jubileo ankoraŭ unu plia estas menciinda. Ni malkovris, ke eniris la vicojn de la esperantistaro antaŭ 50 jaroj Sinjoro Teo Jung, eldonisto kaj redaktoro de la multlegata Esperantogazeto "HEROLDO DE ESPERANTO"!

Baldaŭ post sia esperantistiĝo Teo Jung ekagis en la regiono de sia naskiĝo kaj tie aktivigis la Rejnland- kaj Vestfalian Ligon ("ReVeLo"). Jam frue li ankaŭ montris sian emon al la ĵurnalismo kaj sian kapablon verki artikolojn kaj rakontojn, i.a. en la revueto "Progreso", la organo de "ReVeLo".

En 1920 Teo Jung fondis la semajnan gazeton "Esperanto Triumfonta", kies nomo en 1925 ŝanĝiĝis al "Heroldo de Esperanto". Tiu konata gazeto, kiu donas primovadajn novaĵojn el la tuta mondo al la tuta mondo, daŭre regule aperadis kaj aperadas, nuntempe dusemajne. Ĝi multe kontribuis unue al la aktivigo de la germana movado kaj poste ankaŭ donis instigojn al la internacia movado.

Kiam en la komenco de la tridekaj jaroj la politika klimato en Germanujo fariĝis tro prema por lia laboro, Teo Jung translokiĝis kun sia entrepreno al Nederlando, kie li ankoraŭ nun loĝas en Scheveningen. De tie li seninterrompe ĵetis sian gazeton en la mondon, ofte en malfacilaj cirkonstancoj, ĉar ankaŭ li konas la problemon de abonantoj en nepagipovaj landoj....

Sed Teo Jung daŭrigis kaj li havas la meriton, ke li jam de jaroj montras al la mondo, ke eblas esti profesia esperantisto, ke eblas vivi per Esperanto, ke vivplenumo, vivocelo kaj vivrimedo povas esti tio, kion multaj eksteruloj supozas nur malgrava ludaĵo. Multajn jarojn li posedas floran tan eldonejon de esperantaj gazeto kaj libroj. Li kombinas komercan senton kun lerta redaktado kaj tiel li donas ĝuste tion, kion liaj legantoj deziras kaj plenumas bezonon de la movado.

Krom la gazeton Heroldo li eldonis ankaŭ plurnajn valorajn librojn. El la lastaj jaroj ni citu nur la bonegan originalan verkon "Kredu min, Sinjorino" de Cezaro Rossetti, la tradukon de la konata verko "Tartarin de Taraskono" de la franca aŭtoro Daudet kaj, laste, la tradukon de tiu kortuŝa verkaĵo skuinta la konsciencon de la mondo, la Taglibro de Anne Frank.



Provizi la movadon jaron post jaro per regule aperanta gazeto kaj riĉiĝian literaturon per valoraj verkoj estas laboro, kiu meritas ĉies dankon. Eble, Teo Jung mem dirus, ke ne estas specialaj meritoj, ke se li ne farus tion, certe alia tion farus, sed tion ni ne kredas. Teo Jung estas Teo Jung kun

ĉio kion li faras kaj skribas. Ni ne vidas, kiu farus ĝin kiel li.

Kompreneble, ankaŭ al tiu ĉi homo — kiel al ĉiu alia, kiu laboras publike — ne mankis atakoj, eĉ ankoraŭ en la lastaj jaroj. Ni ĝojas diri, ke en tiuj okazoj li ĉiam trovis U.E.A. — kiu en 1952 rekonis liajn meritojn per nomigo kiel Honora Membro — senkompromise ĉe sia flanko. Sed ankaŭ en tiu ĉi jubilea momento ni sentas nin ligitaj al li kaj ni esprimas al li niajn plej varmajn bondezirojn. Ke ankoraŭ longe li povu daŭrigi sian laboron kaj ke, flankalflanke, reciproke subtenante unu la alian, ni marŝu al la fina celo!

M. H. V.

## GRAVA INFORMO :

### Esperantologio reaperos

La grava internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto nun reaperos per eldono en oktobro de la unua numero de la dua volumo. La interesa enhavo de la 70-paĝa kajero ampleksas artikolon de profesoro W. E. Collinson pri ĝermanaj elementoj en la vortrezoro de Esperanto, du artikolojn pri la vortfarado de la internacia lingvo, verkitajn de inĝeniero J. Isbrucker kaj d-ro A. Albault kaj daŭrigotan artikolon de D. B. Gregor pri la kondicionalo. Malpli longajn artikolojn verkis profesoro Edm. Privat pri uzado de fremdaj lingvoj, profesoro N. Kawasaki pri la japanoj kaj la esperanta elparolo kaj d-ro Hugo Sirk pri la uzado de "Per" kaj "De". Fine oni trovas ĝisdatajn notojn pri universitataj katedroj de Esperanto.

Esperantologio aperas per kajeroj 48-80-paĝaj formantaj volumojn 250-300-paĝajn. La kajeroj estas eldonataj laŭ la cirkonstancoj, unu volumo kovranta ĉ. 3 jarojn. Jen sekvas provizora listo de perantoj kaj abonprezoj. Kie ĉe lando ne estas indikita kotizo, validas la baza kotizo, kiu estas por la dua volumo 6 us. dol.

**Britujo** (35 sh) : S-ro M. C. Major, 1, Pembridge Square, London, W. 2. **Ĉeĥoslovakio** : Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, Blanická 4, Praha 12. **Danlando** (35 d. kr.) : Administracio de Esperantologio, S-ro Eskil Svane, Lindegaardsvej 28 c, Kopenhago-Chl. **Francujo** (2500 fr.) : Sennacieca Asocio Tutmonda, Avenue Gambetta 67, Paris 20. **Hispanujo** (300 ps) : S-ro V. Hernandez Llusera, Avenida Ejército Español 59, Sabadell. **Hungarujo** : D-ro Bálint Szemenyei, Huba-U. 38, Orosháza. **Jugoslavio** : Slovenia Esperanto-Ligo, Miklošičeva 7, Ljubljana. **Nederlando** (18 gld) : S-ro C. van Essen, Floretstraat 10, Rotterdam 25. **Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, ul. Nowy Swiat 27, Warszawa. **Svislando** (22 sv.fr.) : S-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, Romanshorn. **Usono** (6 dol.) : S-ro R. C. Marble, P. O. Box 4127 Van Nuys, California. **Finnlando** (1700 m) : S-ro K. Jokinen, Töölöntulinkatu 7, Helsinki-Töölö, Poŝtkonto 9299.



La aŭtoro ne klarigas, kiamaniere versoj, ĉu aŭ ne poeziaj, kondiĉe ke ili legiĝas flue, povas malklarigi la rakonton! Oni devus konkludi, ke li ne legis la rakontojn de Chaucer (14), se tio ne estus evidenta absurdaĵo! Sed parolante pri la poezia lingvaĵo de *Beŭvulfo*, la sama aŭtoro diras plue:

"Tiu vortprovizo kaj esprimmaniero kreas la specialajn belon, riĉecon kaj komplikecon de la anglosaksa poezio . . . . Kaj ĝi kreas la ĉefan malfacilecon je kontentiga tradukado de iu anglosaksa poemo. Ezra Pound (15) sukcesis per sia mirinda kaj fama versio de la *Marvaginto* . . . ." (16)

Do, kvankam Pound jam pruvis, ke oni povas sukcese fari poezian tradukon de anglosaksa poemo, nia aŭtoro tamen obstine elektas fari prozan version. Komprenoble, li ne estas poeto, kaj "ni devas akcepti la fakton, ke ne tre multaj laborantaj tradukistoj estas kreaj artistoj; se ili estus tiaj, ili kreus originalajn artaĵojn kaj ne tradukus" (17). Malgraŭ la evidenta fakto, ke traduki poemon kapablas nur poeto, kaj la pruvita fakto, ke tradukoj far poetoj estas ofte altnivelaj, tio ne detenas la nepoetojn de tiaspeca tradukado, nek de la aplomba asertado, ke la tradukado de poezio ne eblas! Kiel refreŝige estas, legi trafan analizon pri la kaŭzoj de tiu ĉi bedaŭrinda situacio fare de alia angla aŭtoro!:

"La tradukado de poezio, precipe la antikva poezio, postulas lertecon treege similan al tiu de ĵonglisto. Per certa mano kaj ŝajna senpeno la koloraj pilkoj de signifo, aludo, formo, sono kaj ritmo devas esti ĵetataj kaj kaptataj. En Anglujo, kie oni ĉiam tre alte estimadis diletantojn, ekzistas tendenco forregali la lertaĵon kiel neeban. Niaj tradukantoj elektas unu-du pilkojn, kies ekbrilo ekplaĉas al ili, kaj lasas la ceterajn forruliĝi al la planklomoj (18), klarigante, ke ili retenis la sole gravajn." (19)

Li pravus. La decida faktoro en tradukado, la sola kondiĉo por ĝia "ebleco" aŭ "neebleco", estas la talento de la tradukanto. Anekdoto povas tion ilustrati: Amiko mia provis konvinki lernejestron pri la meritoj de Esperanto. "Bone", diris la lernejestro (konfesinde, iom stulte!), "se vi sukcesos traduki en Esperanton la vortludan versaĵon:

Ben Battle was a soldier bold,  
And used to war's alarms;  
But a cannon-ball took off his legs,  
So he laid down his arms,

mi konsentos, ke la internacia lingvo estas taŭga traduklingvo. Nia franca profesoro jam certigis al mi, ke estas neeble traduki ĝin en la francan." Mia amiko trovis solvon, ne nur por Esperanto, sed ankaŭ por la franca! — ĉar, kiel li klarigis al la lernejestro, la traduko de vortludoj dependas, ne de la lingvo, sed de la sprito de la tradukanto. (Bedaŭrinde, tiuj efemeraj traduketoj jam delonge perdiĝis, sed mi memoras, ke la solvo en ambaŭ lingvoj dependis de la duobla signifo de la vorto

"membro".) Tiel same, la tradukado de poezio dependas de la genio de la tradukanta poeto.

Kelkfoje oni aŭdas, ke iu lingvo, aŭ lingvo entute, "kapablas" aŭ "ne kapablas" fari tion aŭ alion. Tia aserto implicite ignoras la fakton, ke lingvo per si mem nenion signifas. Signifon donas al ĝi la homoj, kiuj ĝin uzas:

"La plimultaj vortoj uzataj eĉ de primitivuloj havas nenian rekoneblan similecon al tio, kion ili signas. Ili estas tute konvenciaj; tio estas; signifas devas esti donitaj al ili artefarite per ia subkomprenata konsento inter anoj de la socio, kiu uzas ilin." (20)

Tio ĉi fariĝas tute evidenta, kiam la ŝlosilo de la konvencioj perdiĝas, ekz-e: ĝis la retrovo de la Roseta-ŝtono, kiu ebligis ekvaciigon de konvenciaj signoj de unu lingvo kun tiuj de alia (t.e., tradukon), la lingvaĵo de la antikvaj egiptoj havis nenian signifon por la modernaj homoj. Komprenoble ankaŭ la *sonoj* de fremda lingvo havas nenian signifon por la homoj ĝis ili ellernis la konvenciajn signifojn, pri kiuj interkonsentas la uzantoj de tiu lingvo. Lingvo, do, posedas nur tiom da signifo kiom al ĝi donas la homaj mensoj. Se mi uzas la anglan vorton *incarnadine*, la plimultaj "edukitaj" britoj tuj pensas pri unu fama verso de Ŝekspiro kaj tiu vorto do havas por ili tiun "asociecon" (kvankam estas dubinde, ĉu tio multe aldonas al ilia kompreno de ĝia "signifo"); sed se mi diras ĝin al mia loka buĉisto, estas cent ŝancoj kontraŭ unu, ke li eĉ ne komprenos min, ĉar li ne "lernis" tiun vorton, kaj neniam legis Makbeton. Kaj eĉ en edukita rondo, se al iu ĉarma virino, kiu invitas min sidigi apud ŝi, mi respondas:

"Ordonu via donas tian raven,  
ke ĝin obei tuj jam ŝajnus tarde", (21)

estas tre verŝajne, ke eĉ en ŝia subkonscio ne vekigis rememoroj "mortintaj kaj forgesitaj" pri la kunteksto, kiun havas tiu versparo en la verko de Dante. Okazos certagrada paneo de interkomunikigo.

Sur la kampo de poezio, tio signifas, ke la "kunfandiĝo de sentuma kaj sprita spertoj" estas "mistera" nur pro tio, ke ĉiu homa menso estas altgrade unika, kaj ke la lingvaĵo de poezio, kiam ĝi estas uzita por komuniki ion malprecizan, estas mem tre malpreciza; tiel ke la grado de poezia komunikigo dependas ĉefe de la grado de simpatio inter la menso de la poeto kaj la menso de la koncerna leganto. La tuta tradicio, el kiu leviĝas la literaturo kaj al kiu ĝi aludas, ekzistas, kiel dinamisma forto, nur en la mensoj de la homoj hodiaŭ vivantaj, kaj ne en la lingvo mem: ambaŭ daŭre ŝanĝiĝadas. Kiam la poeto Gray skribis:

Fair Science frowned not on his humble birth,  
And Melancholy marked him for her own,

la vortoj *science* kaj *melancholy* havis konvenciajn kaj asociajn signifojn ne tute samajn, kiel ili havas

"Ĝe en lingvoj havantaj rikan tradicion tiurilate la formado de terminaro ofte troviĝas en la manoj de la tradukanto, kiu ne ĉiam kapablas plenumi sian respondecon tiurilate, kaj kiu ne ĉiam ĉe konscias pri ĝi." (23)

Ekzemplojn de tio prezentas en multaj lingvoj la terminoj entris tiujn lingvojn pere de tradukoj. Nu, kvankam la signifoj de la esperantaj radikoj estas ĝenerale klaregaj kaj precizaj, kun tamen kelka alĝiulo de asocio, pro la gramatika strukturo de la lingvo la tradukanto povas *guste pro tio* redoni kun alĝigra precizo la nuancojn de originala teksto. La sistemo de sufiksoj kaj vortkunmetao ebligas atingi altan nuancon. La vorttute simple ne ekzistas ekvivalento en ekzemple la angla lingvo, nek ekzistas en tiu lingvo tradicia esprimo per kiu oni alparolas ĝuste multstilon, tiel ke angla traduko devus ignori tiun nuancon.

Agrabla kaj utila rezulto de la alĝira fleksebleco, elasteo kaj precizeco de Esperanto estas tio, ke ĝi bonege adaptiĝas al la apartaj ecoj de la plej diversaj lingvoj. En rilato al la poezia stilo, tio multe helpas al tradukado fidela, kiel laŭ la senso, tiel ankaŭ laŭ la formo. Francajn aleksandrojn, ekzemple, oni kutime tradukas en angla lingvo per kvinjamboj, kaj inverse; Esperanto bonege akceptas ambaŭ versojn, tiel ke aleksandrojn oni tradukas per aleksandrojn, kaj kvinjambojn per kvinjamboj, kaj en ambaŭ okazoj ne sentiĝas ia "tremdeco". Krom tio, la lingvo posedas multajn kvalitojn, kiuj alĝigra taŭgigas ĝin kiel tradukilon, kaj, antaŭ ol transiri al konsiderado pri kelkaj konkretaj tradukexemploj, estos utile ĵeti almenaŭ suprajn rigardojn al nur kelkaj el ili.

La akuzativa finaĵo -n certagrade liberigas la vortordon de Esperanto. Akuzativo ekzistas en ĉiuj lingvoj, sed ĝi povas esprimiĝi laŭ du manieroj: aŭ ĝi esprimas la objekton sen fonetika morĉemo, per la nura pozicio de la vorto en la frazo; aŭ ĝi tion faras per iu fonetika morĉemo, kiu povas esti deklinacia, prepozicia aŭ postpozicia (25). Aparte-nante al la dua grupo, Esperanto ĝuas konsiderindan liberecon de la vortordo, kiu ebligas per ĝi repoduki senperforte multajn apartaĵojn de la aliaj lingvoj, kio ne estas ebla por lingvo havanta pli rigidan vortordon. Plue, la akuzativo multe kontribuas al la klareco de Esperanto, kion povas mallonge prui unu-du ekzemploj:

hodiaŭ: tiun fakton devas lerni ĉiu leganto, aŭ li sufiĉe grave miskomprenos la versojn.

Tamen tradicio ekzistas, kaj la lingvo ja posedas rekonatajn kaj rekonobajn signifojn, subsignifojn kaj asociojn. Kaj neniu povas dubi, ke la sumo de tiuj pli plene konstatos homo, kiu uzis la koncernan lingvon ekde la infanaĝo kaj vivis kaj edukis en la medio de la koncerna lingvo, ol homo, kiu ĝin eklernis jam kiel kreskinto, kaj kiu pasigis la pliparton de sia vivo en alia lingva medio. Tiu ĉi senduba fakto donas al Esperanto unu el ĝiaj du gravaj avantaĝoj kiel traduklingvo. Nacilingvaj tradukoj estas preskaŭ ĉiam farataj de homoj el la dua supra kategorio, t.e., de homoj, kiuj tradukas en la gepatran lingvon el lingvo malpli perfekte posedata. Tiu situacio estas tiel ĝenerala, ke ĝi estas implicita en ĉiu studo pri la tradukado, ekze: "la tradukanto devas decidi, kio estas la signifo de la frazo, kaj poste esprimi tion *en sia propra lingvo*" (mia kursivigo, W.A.). (22) La esperantaj tradukoj, male, estas ordinaraj farataj de homoj, kiuj denaske posedas la originalan lingvon kaj tradukas en lingvon, kiu, pro ĝia gramatika orĉeco kaj semantika precizeco, *ili povas regi same perfekte kaj semantike kiel *stian denaskan lingvon**. Sekve tiuj tradukantoj scias, ĝis plejble perfekte gradon, almenaŭ la sumon de tio, kion ili devas redoni en la internacia lingvo. Tio estas jam granda avantaĝo: ili plejble "sentas" la originacion.

Duan avantaĝon ĝuas Esperanto rilate la transdonon de asocioj kaj nuancoj. Forta esperantista tradicio, lingva kaj literatura, jam ekzistas; dum la periodo de unu normala homvivo kaj ĉe pli, la lingvo estas daŭre uzita, — praktike oni nun parolas pri la "tria generacio" de esperantistoj, — granda literatura kaj tradukita estas krita, kaj kompreneble la esperantaj vortoj jam posedas nuancojn kaj asociojn indigene esperantistojn. Ĉiu uzanto de Esperanto devas konsci pri la ekzistanta pezo de tradicio, kiu forte influas lian propran uzadon de la Internacia Lingvo. Tamen Esperanto ne estas, kaj ankoraŭ dum jarcentoj ne povos esti, tiel rigida kiel la naciaj lingvoj. Tradukante el nacia lingvo en alian nacian lingvon, oni trairas du stadiojn: oni studas la vorton aŭ frazon en la originala lingvo, konstatas ĝian precizan signifon kaj la asociojn, kiujn tiu vorto aŭ frazo kunportas; kaj poste oni klopodas trovi vorton aŭ frazon en la traduklingvo, kiu havas precize saman signifon kaj asociojn. Sed trovinte la plej taŭgan ekzistantan solvon, oni tro ofte konstatas, ne nur, ke mankas al la traduko kelkaj el la originaj asocioj, sed ankaŭ, ke la tradukvorto aŭ frazo alportas kun si asociojn el sia propra medio, kiuj tute ne necesas aŭ taŭgas por traduko de la originalaĵo. Ĝe pli, oni ne malofte trovas, pro la noveco aŭ ekstrema tremdeco de la originala temo, ke la traduklingvo tutsimpe ne posedas la rimedojn por ĝin esprimi:

*Il insulta le président plus violemment encore que l'orateur précédent* (ĉu tio signifas: li insultis la prezidanton eĉ pli krude, ol la antaŭa oratoro — aŭ — ol la antaŭan oratoron?); *je trouvais ce fruit délicieux au cours de mes longues promenades* (ĉu: mi trovis tiun frukton bongustan dum miaj longaj promenadoj — aŭ — mi trovis tiun frukton bongusta dum . . . .?); *il avait dans la terre une somme enfouie* — La Fontaine (ĉu: li havis monon enfositan en la tero — aŭ — li estis enfosinta monon en la tero?).

Estas utile, aldoni al tio ankaŭ jenon:

"Oni probable kontraŭdiros, ke, se tiuj frazoj estas efektive dusencaj . . . tamen la ĉirkaŭteksto permesas ilin senerare kompreni. Tio estas ofte vera, sed ne ĉiam; kaj oni devas konfesi, unue, ke ĉiam ekzistas la risko, ke tiu ĉirkaŭteksto mankas aŭ mem ne estas sufiĉe preciza por eviti ĉian konfuzon; due, ke ekzistas aparte gravaj tekstoj — filozofiaj, juraj, sciencaj — ĉe kiuj subtilo de la penso nepre postulas, ke ĉia eĉ plej malprobabla dubo estu sisteme eliminata." (26)

Al la stila fleksebleco de Esperanto kontribuas ankaŭ la akordiĝo, laŭ nombro kaj kazo, de adjektivoj kun siaj substantivoj. Tio ebligas multajn stilajn apartaĵojn kaj koncizaĵojn, tre efikajn precipe en poezio. Tri mallongaj ekzemploj devas ĉi tie sufiĉi; sed se oni imagas la adjektivojn sen akordiĝo, oni komprenos la esencan gravecon de la afero:

- (i) Mi sidis riverborde kaj, mizera,  
Stelegaĵn lampojn sur la pont' rigardis;
- (ii) Lampgutoj falis al la frunt' malvarma:  
Si viŝis ilin per la haroj, larma.
- (iii) La robon blankan ruĝa bend' traŝtriiis.

La precizeco kaj klareco de la internacia lingvo rezultiĝas de multaj faktoroj. Bedaŭrinde oni povas ĉi tie doni nur malgrandan listigon de ankoraŭ kelkaj el ili:

(a) La ebleco senpere verbigi substantivojn kaj adjektivojn, adjektivigi substantivojn kaj verbojn, k.s.

(b) La lasta uzado de la adverbo. La supra ekzemplo (i) liveras belan ekzemplon per la vorto *riverborde*.

(c) La sistemo de sufiksoj. Vidu, ekzemple, la distingon inter *soleca* kaj *solema*.

(d) La refleksiva pronomo *si*. Ekzemple: *Him Kleon bandaged with strips torn from his tunic* (ĉu: Lin Kleon bandaĝis per strioj ŝiritaj de lia tuniko — aŭ — de sia tuniko?).

Fine, la formfidelan tradukadon de poeziaj verkoj multe plifaciligas la altgrada rimriĉo de Esperanto. La rimeblecoj varias de lingvo al lingvo, ekz-e:

"Jen kelkaj vortoj pri la specialaj problemoj de tradukado el la ĉeĥa en la anglan. Kun escepto eble de la litova, la ĉeĥa estas hodiaŭ la plej altgrade fleksia lingvo de Eŭropo, eĉ pli ol la rusa. La

angla, aliflanke, estas la malplej fleksia e lingvo. En la ĉeĥa, sekve, vortoj kiuj ne rim nominativo eble rimas en aliaj kazoj; simil identaj sufiksoj povas okazigi rimojn, k.t.p. mallonge, rimebloj estas senfine pli multnombro en la ĉeĥa ol en la angla." (27)

Esperanto estas tre riĉa je rimoj (28) — oni diri, ke neniu esperanta vorto estas nura bala la rimvortaro, kaj cetere la rimeblecoj est variaj — kaj tio kompreneble ebligas repr. eĉ komplikajn originalajn rimskemojn, kiel de sonetoj, spenseraj strofoj, tercinoj, k.t.p.

Ankaŭ unu plian necesajn ĝuas Esperan allogis al si multnombro poetojn geniajn kaj tajn, kiuj dediĉis sin interalie al la traduko la internacian lingvon de poemoj el siaj plej nacilingvoj.

Ĉio ĉi certigis, ke Esperanto estas nenie supera al la naciaj lingvoj kiel belarta tra-

## SUBNOTOJ

(12) The Times Literary Supplement, 24 p. 436.

(13) L. W. Tancock: Style in translation: French. (Aspects of translation, Londono p. 49).

(14) Geoffrey Chaucer (1340?-1400?): angla poeto, kies ĉefverko estas la "Rakono Canterbury".

(15) Ezra Pound: nuntempa usona poet

(16) David Wright: Beowulf. Londono Enkonduko, p. 21-23.

(17) Leonard Forster: Translation, an in-tion. (Aspects of translation, Londono, 1958) La dua parto de nia citaĵo estas bela nekonaĵo: multaj kreaĵoj artistoj en multaj landoj tradukas; kaj la sperto de multaj el ili doni tajn motivojn por la aserto, ke la tradukado bonega evoluigilo kaj ekzercilo, pri kiu da tempo al tempo okupiĝi ĉiu poeto.

(18) Kompreneble, teatra metaforo.

(19) Peter Green, en recenzo en "The Old (Londono) ĉirkaŭ decembro 1956, pri libro, kiu bele atestas la "eblecon" de poezia tradukado "Translating Horace" de J. B. Leishman.

(20) Prof. V. Gordon Childe: What happened in history. Londono, 1942, represo de 1950, p. 79-80.

(21) Dante: *Infero*, II, 79-80.

(22) Leonard Forster: Translation, an in-tion. (Aspects of translation, Londono, 1958)

(23) Verk. cit. sub (22), p. 9.

(23a) La subtilajn kaptilojn, kiuj embus tradukanton, bele ekzemplas jeno: "En sama Internacia Instituto de Intelektua Kultura eldonis francan tradukon de hajkoj de la poeto Baŝo, faritan de Kuni Macuo Steinilber-Oberlin. Unu el ili, plej kortuŝa,



artikolo estas titolita "Por la Unueco de la Homaro — la Verko de Zamenhof". La artikoloj estas skribitaj surbaze de materialoj liveritaj de CED. "UNESCO-Features" estas sendata de UNESCO al miloj da gazetoj tra la mondo.

**Japana Radio.** — Prof. Hideo Yagi faris tri prelegojn: unu germanlingve por transmara disaŭdigo kaj du en la japana lingvo.

**Postmarkoj.** — Pollando eldonis du postmarkojn: unu de 60 gr. kun la surskribo "T. L. Zamenhof Aŭtoro de Esperanto 1859-1917" kaj alian de 1,50 zl. kun la surskribo "1959 - Jubilea Jaro de Zamenhof".

**Zamenhof-sipo.** — En Split (Jugoslavio) estis enmarigita granda pola sipo, kiu ricevis la nomon "Zamenhof" kaj de nun portas ĝin sur ĉiuj oceanoj kaj maroj, de unu lando al alia. La ceremonio okazis la 12-an de julio kaj ĝin ĉeestis, inter la aliaj, la ambasadoro de Pollando en Beograd.

**Libro pri Zamenhof.** — En Varsovio estas ĵus publikigita grava verko de Maria Ziolkowska sub la titolo "D-ro Esperanto". La verko estas originale skribita en la pola. Isaj Dratwer faris la esperantan tradukon. Ĝi aperis en ambau lingvoj, tiel ke sur la paraj paĝoj estas presita la Esperanta teksto, kaj sur la malparaj la pola. Eldonombro: 8,000 ekzempleroj. Multaj fotoreproduktajoj. Bindita, 335 paĝoj. Recenzo en unu el la sekvantaj numeroj.

**Sciencaj revuoj kaj gazetoj.** — Pluraj studoj jam aperis en diversaj sciencaj revuoj, ekzemple en "Problemy", popular-sciencia pola revuo eldonata en 100,000 ekzempleroj (art. de Isaj Dratwer); en "Japana Medicina Ĵurnalo", gravega sciencia publikaĵo (art. de Prof. Seicho Nishi); en la "Memoriga Tezaro" de Koroĝo (art. de Hong Hyeong Eui) kaj kelkaj britaj parkoj — En kelkaj britaj parkoj la loka esperantistaro sukcesis aranĝi florbledojn indikantajn la centjaran datrevenon. Tiaj florbledo estis aranĝitaj en la parkoj de Oldham, Blackburn kaj Leicester. La bele aranĝitaj florbledo, ĉiuj kun la verda kvinpinta stelo, la vorto "Esperanto" kaj la indiko-1959 vekis grandan interesiĝon en tiuj urboj.

## La mondo festas la centjaran datrevenon

El ĉiuj partoj de la mondo alvenas ĝojaj informoj: La nombro de jam publikigitaj artikoloj pri Zamenhof estas vere konsiderinda. Ĉiutage alvenas en la C.O. aŭ en la oficejon de CED eltrancaĵoj kun artikoloj pri Zamenhof. Kelkaj ekzempleroj: la artikolo de Prof. Privat aperis nur en Danlando en 21 gazetoj kun eldonombro de ĉ. 150,000 ekzempleroj; aliaj artikoloj pri Zamenhof aperis en Danlando en pliaj 123,000 ekzempleroj; ĝis la fino de julio en Italujo aperis 115 artikoloj pri Zamenhof; la artikolo de Prof. Lapenna publikigita ĝis nun en dudeko da gazetoj kaj revuoj, inter la aliaj en la grava revuo "Palatino", revuo pri artoj kaj kulturo, en la organo de la Belga Socialista Partio "Le Peuple" kaj; en septembro tuta aro da artikoloj kaj informoj en la norvega gazetoj okaze de la granda festo en Oslo; en Francujo multaj artikoloj precepte en la provinca gazetoj; la revuo "Bibliotheque de Travail", ilustrita, dediĉis sian tutan numeron de julio al la centjara datreveno; artikoloj pri Zamenhof aperis ankaŭ en gazetoj kaj ĵurnaloj de Japanujo, Indonezio, Vietnamo, Koreo kaj aliaj aziaj landoj; D-ro Borovecki, nun en Etiopio, publikigis du artikolojn en la amhara lingvo (tio estas la unuaj artikoloj pri Esperanto iam publikigitaj en tiu lingvo). Entute ĝis nun, laŭ la proksimumaj taksoj, aperis en la tuta mondo ĉ. 4,000 artikoloj kaj informoj. Oni atendas multe pli grandan nombron en novembro kaj decembro.

**UNESKO pri Zamenhof.** — La publikaĵo de UNESCO "UNESCO-Features" aperigis en sia n-ro 336 de la 27-a de julio artikolon pri Zamenhof de Françoise Niederhausen tre bonan. En la angla lingvo ĝi havas la titolon "Zamenhof — la Patro de Esperanto", dum en la franca lingvo la sama

*Au soleil, on sèche les kimonos.  
Oh ! la petite manche  
de l'enfant mort !*

Je la suno oni sekigas la kimonojn. Ho ! la maniketo de la mortinta infano !. Estis rezervite al esperantistoj, s-ro Teruo Mikami, kaj al la esperanta revuo "Comoto" (N-ro 217, Jul. 1958) rivej, ke tiuj tri versoj entenas kvar miskomprenojn: ĉar en la aludita tempo oni *aerumas* la kimonojn en la ombro, ĉar *kosode* signifas ne "manikon", sed "malvastamikan kimono", ĉar tute la *mortinta infano* estas efektive "mortinta ĵunulino" (Prof. G. Waringhien, "Lingvo kaj Vivo", p. 418.)

- (24) Ivan Vazov: Sub la ĵugo. Esperanta traduko de "Pod igoto", Sofio, 1959, p. 31.
- (25) Vd. Prof. G. Waringhien: La akuzativo en Esperanto, (Esperantologio, vol. I, p. 33-52), el kiu mi ĉerpis miajn ekzemplerojn pri tiu temo.
- (26) verk. cit. sub (25), p. 41.
- (27) E. Osers kaj J. K. Montgomery: Modern Czech Poetry. Londono, 1943, p. 11.
- (28) Pri la rimiko de Esperanto vidu: Malgranda Revuo, 1951, n-ro 1, p. 14-15, kaj 1952, n-ro 1, p. 21-22.

**La Baza Broŝuro en plia lingvo.** — La broŝuro kun la bazaj dokumentoj pri la Zamenhof-Jaro kaj la artikolo de Prof. Privat estis publikigita ankaŭ de la Argentina Esperanto-Ligo. Ĝi estas presita kaj tre belaspekta.

**Dana eldono de CED/5.** — La konata dokumento de CED, kiu enhavas la koncizan studon de Prof. Lapenna pri Esperanto, estas publikigita ankaŭ en la dana lingvo entute en 3.100 ekzempleroj.

**Fotoj pri Zamenhof.** — S-ro Henk Thien (Nederlando) dum pluraj jaroj kolektis fotojn de Zamenhof aŭ en ligo kun li. La tuta kolekto — certe la plej granda en la mondo — havas ĉ. 160 diversajn fotojn. CED havigis por siaj bezonoj unu ekzempleron de la kolekto. Pluraj el tiuj fotoj estos publikigitaj en la decembra numero de "Esperanto"!

**Lokaj festoj.** — En pluraj urboj jam okazis Zamenhof-festoj. Laŭ la ĝis nun ricevitaĵoj informoj, sendube la plej brila kaj plej altnivela okazis en Oslo (Norvegujo) la 14-an de septembro. La programo enhavis plurajn muzikajn punktojn kaj paroladojn, inter la aliaj de eksterlandanoj s-roj Ivo Rotkvić, Ejzo Itoo kaj Tibor Sekelj. La ĉefparoladon faris lektoro C. Støp-Bowitz. Ĉeestis pli ol 600 personoj, elstaraj en la kultura kaj socia vivo,

kiuj komplete plenigis la aŭlon de la Universitato.

El aliaj lokaj festoj aparte menciindaj estas tiu okazinta en Helsinko en la Solena Salono de la Universitato, dum kiu parolis Prof. D-ro Paavo Ravila, Membro de la Akademio de Finnlando, kaj la festo de la 30-a de septembro en la Koncerta Domo de Stockholm. Tiun lastan ĉeestis ĉ. 400 personoj kaj parolis la konata lingvisto Prof. Collinder.

**Granda festo en Kopenhago.** — La 15-an de decembro okazos en Kopenhago granda publika aranĝo, al kiu estas invittaj ankaŭ Prof. G. Canuto, prezidanto de U.E.A. kaj Prof. I. Lapenna, ĝenerala sekretario. Oni atendas, ke la aranĝon partoprenos, inter la aliaj eminentuloj, kelkaj ministroj. La programo entenas ankaŭ muzikajn punktojn, paroladojn de s-roj Prof. Lapenna kaj Prof. Canuto. Post la aranĝo estos bankedo, kiun sekvos granda balo. Oni atendas, ke tiun aranĝon vizitos ankaŭ multaj esperantistoj el aliaj danaj urboj, el suda Svedujo kaj norda Germanujo. Survoje al Kopenhago Prof. I. Lapenna parolos en la Zamenhof-festoj de diversaj urboj, inter kiuj Brugge, Antwerpen, Den Haag, Arnhem, Essen, Dortmund, Hamburg.

BRUSELO - 30.VII - 6.VIII - 1960



## 45-a Universala Kongreso de Esperanto

Bruselo - 30.VII — 6.VIII.1960 - Belgujo

— Sub la Alta Protektado de  
L. M. Baŭduino, Reĝo de la Belgoj

### OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1 Oktobro 1959

#### Kotizoj :

Ĝis la 31-a de decembro 1959 validas la jenaj kotizoj :

- Kongresano 450.- b.fr.
- Edzino de kongresano 225.- b.fr.
- Junul(in)o ĝis 20 jaroj kaj studentoj 150 b.fr.

#### Pagoj :

La kotizo devas esti pagita ĉe la kongresaj Perantoj, ĉe U.E.A., ĉe la kongresa konto ĉe la kongresa konto ĉe la "Banko de Bruselo" aŭ ĉe la poŝtĝirkonto n-ro 1776.71 "Universala Kongreso de Esperanto" Bruselo. Aliĝiloj sen samtempe pago ne estas traktataj.

#### Adreso :

La koresponda adreso de la Loka Kongresa Komitato estas : "45-a Universala Kongreso de Esperanto — Bruselo — Belgujo".

#### Telegramoj :

La telegrafa adreso de la Loka Kongresa Komitato estas : "Esperanto Bruselo".

#### Baza artikolo :

Lokaj Esperanto-societoj aliĝintaj al Landaj Asocioj povas mendi kaj senpage ricevi bazan artikolon pri Bruselo kun akompana bilda materialo, por informaj vesperoj dediĉitaj al la Kongresurbo.

#### 1-a bulteno :

La 6-paĝa elegante eldonita 1-a Bulteno de la Universala Kongreso, kun bildoj pri Bruselo, listo de Perantoj kaj provizora programo estas senpage ricevebla, kune kun aliĝiloj ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe la kongresa oficejo. Glumarkoj :

La dukoloraj kongresaj glumarkoj kun la kongresa emblemo estas aĉetebla ĉe la Landaj Asocioj, ĉe U.E.A. aŭ ĉe la kongresa oficejo je la prezo de 30 b.fr. por 3 folioj de po 25 markoj.

#### Antaŭkongreso :

La oficiala Antaŭkongreso okazos en Arnhem (Nederlando) de la 27-a ĝis la

29-a de julio '60 kun jena provizora programo :

Merkrede, la 27-an de julio : alveno de la partoprenantoj. Vespere : agrabla kunesto.

Ĵaŭde, la 28-an de julio : aŭtobusa ekskurso en la ĉirkaŭaĵo de Arnhem kaj vizito al la naturparko "Hoge Veluwe" kaj Van Gogh-muzeo. Vespere : vizito al la provinca domo kaj kultura vespero.

Vendrede, la 29-an de julio : vizito al foiro en la urbo; akcepto flanke de la urbestro, rondveturado tra Arnhem. Vespere : vizito al la pavilono en "Sonsbeek".

Sabate, la 30-an de julio : forveturo al Bruselo.

#### Honora protektanto :

Lia Moŝto Baŭduino, Reĝo de la Belgoj, akceptis esti la Honora Protektanto de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto.

#### Statistiko :

(ĝis fino de septembro) Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 4, Belgujo 61, Brazilo 5, Britujo 10, Bulgarujo 5, Ĉeĥoslov. 1, Danlando 4, Finnlando 1, Francujo 12, Germanujo 5, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Italujo 6, Japanujo 3, Jugoslavio 6, Kuvaito 1, Maroko 1, Monako 3, Nederlando 5, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 11, Svisujo 5, Urugvajo 1, Usono 1. Entute 160 el 27 landoj.

G. C. Fighiera,  
Konstanta Kongresa Sekretario

# Esperanto servis por japana filmo

Ligo de Esperanto-Grupoj, konsiliĝi por trovi la tasko, ĉar loĝanta en Kioto mi estus oportuna ia. pro la neceso frekventi la studion.

Kelkaj diris, ke Esperanto en la filmo aperas pli, ol kiam ili supozis. La registoro Itow esprimis, ke li faris bone kun la adopto de Esperanto en sia filmo, kaj ankaŭ, ke li estas danka pro la helpo de esperantistoj.

Ĉirkaŭ 50 tagojn mi vizitis al la studio, funkcias kiel la sekretario de la "Iberiaj aferoj": mia servo estas deĵori surloke, kiam oni filmis scenojn kun esperantaj dialogoj (kiujn tradukis Miyamoto kaj mi), por zorgi la rolancojn, ke ili povu kiel eble plie bone prononci en la lingvo; sed ĉar mankis tempo anticipe instrui ek abococon al la "Iberianoj", kiuj konsistis el diversaj naciaĵoj, dungitaj kiel la ekstraj aktoroj por la filmo, la tuta Esperanto-

teksto tial ne povis pretendi kiel io modela. Krom tiuj, ankaŭ kelkaj geaktoroj japanaj parolis, kaj apenaŭ pli bone (?), ol la neĵapanoj....

Car la iberianoj, precipe la jenaj personoj Judas de Matoso, la generalgubernatoro de Cu-kjang, Antonio de Kastro, la kapitano de "LA PATRINO DE DIO", kaj Don Mirando, oficir, s' sekvas multaj scenoj kun ili kaj konsekvence Esperanto-

dialogoj, kvankam tiuj ĉi estas ofte nelongaj. Ankaŭ la nomo de la ŝipo kaj la personaj nomoj estas ĉiuj esperantigitaj, dum ili sonis alie en la komenco; se tamen oni povus malfacile rimarki, tio estas skribita ĵen kaj ĵen en la dekoroj. En la tuta daŭro de la filmo aŭ 14-minutoj oni ne malforte aŭdas paroli aŭ komandi en iu "Iberia lingvo", kaj devas esti atentaj legi la surimpozojn, kiuj aperas pli ol sepdek foje sur la ekrano.

Se mi skribus detale pri tio, kiel mi devis klopodi kun tiu nekutima tasko, necesus tro granda spaco kaj mi dubas, ĉu ĝi indas aŭ ne, do mi citos ĵen kelkajn dialogojn en Esperanto; ili tamen ne prezentas la tuton:

Kastro: Haltu! Haltu! Prokraston al la ekzekuto!

Heroldo: Jen urĝa ordono de lia mosto!


Mirando: Lia generalgubernatora mosto de Cu-kjang, Don Sebastiano de Matoso degnas domi al vi specialan kompaton; se Konsuzu, akuzitino pentos la antaŭan krimon, kaj montras sin humila antaŭ lia mosto, oni kun aparta konsidero pardonon vin de la mortopuno..... Vi vidas?

Konsuzu: Ne!

M: Mi konsilas vin penti kaj ricevi lian altan favoron.

K: Ne! Kaj tiel plu, k.t.p.....

Tucuo Hugiimoto, KIOTO.



"LA STURMO DE JOHANO ARIMA"

En la supre nomita filmo, farita de la registoro Daisuke Itow, unu el la plej konataj, pluraj dialogoj estas parolataj en Esperanto, kvankam ilin parolas iuj "iberianoj", kaj sekve kelkaj povus kredi tiun la "Iberia lingvo" mem.....

## ESPERANTO EN LA ROLO DE NACIA LINGVO

Iberia lingvo oni faris la internacian en la filmo, ĉar en kies scenario, de la granda registoro mem, aperas kelke da gravaj personoj el tiu Reglando Iberio, en la respektivaj roloj de "generalgubernatoro", "kapitano", "oficiro", kaj ceteraj; kvankam originale verkita, la scenario estas tamen fikcanta laŭ certa afero, kaj kies konsekvencoj el la jaro 1609, kiuj okazis en iu havenurbo, tamen teritorio de certa regno en Eŭropo, kaj ekster Nagasaki; do la aŭtoro ne volis uzi ankaŭ la lingvon de tiu nun ekzistanta lando, tiom pli, se li jam anstataŭigis ĝian nomon per Iberio, pro skrupulo pri eventuala protesto de la konkerna regno. Sed, kiam kunstidis la ŝtabo de la filmo, ne venis glate konkordo pri la tiktla problemo, kiun lingvon do adopti, el la parencaj.....; daktis tiel longe, ĝis fine iniciatis uzon de Esperanto s-ro Nobuo Miura, la estro de Kioto-Studio de la kompanio Daille, kaj produktisto de la nova filmo, kaj tion konsentis la registoro Itow, ĉar kiuj per si mem ja havis la ideon, sed nur ne proponis, opiniante ĝin tamen tro originala en la kazo. Nun, ambaŭ jam decidis la felican ideon tiel realigi, spite fortan kontraŭstaron de pri la internacia lingvo ne informitaj sinjoroj.

Tiam s-ro K. Tokuda, la konkerna propagandisto turnis al s-ro Miyamoto M., la sekretario de Kansai laŭ la peto de la ŝtabo, s-ro Umesao tamen sin zita aŭdi, ke ankaŭ la lasta estas esperantisto. Tiel al asistprofesoro Tadao Umesao, kaj estis surprizokaze menciis pri la entrepreno kaj ĝia malfacilo Tiam s-ro K. Tokuda, la konkerna propagandisto

# CED

Centro de Esploro

kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo  
Telefona ARNold 90-81

## ESPERANTO EN LA LERNEJO

En la aprila numero de "Esperanto" aperis informo pri la enketoj, kiujn faras CED pere de sia kunlaboranto por lernejoj aferoj, s-ro D. Kennedy, koncerne la geinstruistojn-esperantistojn kaj koncerne la lernejojn, en kiuj Esperanto estas instruata.

La informo estis ripetita en la julia-aŭgusta numero de "Esperanto".

La oficejo de CED ĵus ricevis informon, ke al la enketo A (instruistoj) venis entute 117 respondoj, kaj al enketo B (lernejoj) entute nur 42 respondoj.

Se oni konsideras, ke tre verŝajne ekzistas minimume 2.000 geinstruistoj-esperantistoj kaj ke tute certe en multe pli ol 42 lernejoj Esperanto nuntempe estas instruata, oni komprenos, ke la nombro de respondoj estas pli ol malkompleta. Tiuj ĉi enketoj estas gravegaj pro la paŝoj entreprenotaj post la Zamenhof-Jaro en la lernejoj medioj. Ne estas eble doni iajn detalojn pri la plano en la nuna momento, sed unu el la ĉefaj elementoj de la koncerna dokumentaro estos precize la rezultoj de tiuj ĉi du enketoj.

Tial CED sentas sin devigita plilongigi la limitadon por sendo de la respondoj ĝis la 1-a de januaro 1960. La demandoj, ni ripetas, estas presitaj en la julia-aŭgusta numero de "Esperanto" sur la paĝo 130. Ĉiuj geinstruistoj estas varme kaj insiste petataj respondi per poŝtkarto al la demandaro A, dum ĉiuj profesoroj kaj instruistoj, kiuj instruas la lingvon en kiu ajn lernejo aŭ universitato, estas petataj respondi al la demandaro B. La respondojn oni sendu senprokraste al s-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.

Estas espereble, ke almenaŭ nun ĉiu, al kiu estas direktita tiu ĉi alvoko, faros sian devon kaj donos la petitajn respondojn. Efektive temas pri tiel minimuma fortostreĉo — skribado kaj afranko de unu poŝtkarto — ke estas preskaŭ nekredible, ke estas necese fari tiom da alvokoj kaj direkti tiom da petoj por atingi tian minimuman helpon!

## TRI GRAVAJ DOKUMENTOJ

En la lasta tempo CED eldonis, okaze de la Zamenhof-Jaro, tri pliajn dokumentojn en la angla lingvo. La studo de Prof. G. Waringhien "Lazaro Ludoviko Zamenhof" aperis kiel Dok. RDC/6-1. La artikoloj de Prof. I. Lapenna "La Grandeco de D-ro L. L. Zamenhof", de M. Boulton "L. L. Zamenhof-Pionira Poeto" kaj de J. Francis "Integro kaj

Latentoj en la Verko de Zamenhof" estas kigitaj en la Dok. RDC/6-2. Fine, la studo de W. Auld "La Internacia Lingvo, kiel Belaradukilo" aperis kiel Dok. RDC/6-3. La studo de Prof. Waringhien kaj la artikolon de Prof. L. L. tradukis el Esperanto en la anglan la kunlaboranto de CED Edward Ockey. La ceteron trovi en la anglan la aŭtoroj mem.

## ARTIKOLOJ DE CED-KUNLABORANTOJ

Pluraj kunlaborantoj de CED verkis artikolojn okaze de la Zamenhof-Jaro. Kelkaj el tiuj artikoloj aperis dum la tuta jaro en la revuo "Esperanto". Aliaj estis multobligitaj kaj senditaj de la Internacia UEA al la landaj kunlaborantoj por traduki kaj publikigi en la nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. Lastatempe estas tiel senditaj la artikoloj de A. Mildwurf (Britujo) "L. Zamenhof kaj lia Verko de Preston Davis (Usono) "Esperanto kaj la Teorio de Komunikado", de C. Stöp-Bowitz "Lingvaj Problemoj en Natursciencoj", de D. Kennedy "Esperanto — Heredaĵo al la Infanoj de la Morto", de Julia Isbrucker "Unu Mondo Unu Lingvo", de Prof. Hugo Sirk "Lingvaj Spertoj en la Praktiko de la Scienco", de D-ro G. F. Makkink "Zamenhof en la Evoluo de la Komunikado", de Rev. F. M. M. "La Internacia Lingvo kiel Familia Lingvo". Multaj el tiuj artikoloj jam aperis en la nacilingvaj gazetaraj artikoloj de D-ro Makkink vekis interesigon, ke li estis invitita prezenti personece raporton al sciencista kongreso en Varsovio. Oni petu tiujn artikolojn de CED, sed de via landa asocio aŭ informa fako en via nacia lingvo.

## Donacoj

La stato de la 26-a de aprilo	£ 4
Gesinjoroj Laurie, Britujo	37-
S-ro E. P. Crabtree, Britujo	2-
Svisa Esperanto-Societo, Svislando	2-
Doc. Régulo-Pérez, Kanariaj Insuloj	8-
N.N. el Rotterdam, Nederlando	1-17
Prof. Fernández-Menéndez, Urugvajo	7
S-ino Metzer, Francujo	1
S-ro Sikora, Francujo	7
S-ro R. Slot, Nederlando	1-
S-ino M. Duncan, Aŭstralio	18-
S-ro K. R. C. Sturmer, Britujo	10-
S-ro Tom Fraser, Britujo	10-
Stato je la 3-a de oktobro 1959	54-10-

Koran dankon al ĉiuj donacintoj.

Kiel oni vidas, en la nuna momento la donacoj al CED por tiu ĉi jaro estas multe malpli grandaj ol en la pasintaj jaroj. Verŝajne tion kaŭzis la fakto, ke multaj personoj, kiuj kutime financas kontribuojn por la laboroj de CED, ĉi-jare fari donacojn al la Zamenhof-Fondaĵo. Espereble tamen, la fidelaj helpantoj de CED ne forgesos, ke precize en tiu ĉi jaro CED plenumis kaj plue plenumas grandegan laboron. Estas ankoraŭ tempo sendi donacojn por tiu ĉi jaro!

Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de UEA, 7 Eendrachtsweg, Rotterdam, C., Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris, X, Francujo; al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA

asocioj: Argentino, Aŭstralio, Aŭstria, Belgio, Flandra, Itala, Japano, Maroko kaj Svedo.

La demandoj estis senditaj ankau al la nealigitaj landaj asocioj, sed ili, eble, diference de la aligitaj, ne estas subigitaj al la morala devo plenumi la petojn de CED, kiujn ĝi direktas en la intereso de la plua progresigo de Esperanto. La Ĉeĥoslovaka Konsulta Komitato rifuzis sendi la demandojn al siaj eminentuloj. Tamen, unu respondonto venis en Ĉeĥoslovakio pro klopodo de privata persono. Ekzistas landaj asocioj, kiuj informis, ke la "sekretario faris nenion rilate la statistikon". Aliaj sur simpla postkarto skribis kelkajn nomojn de siaj eminentuloj, sen iaj ajn pliaj indikoj.

Evidente, en tiaj kondiĉoj kaj kun tiaspaca emo helpi al grava enketo, kies rezultoj estus povintaj fariĝi unuaranga materialo por etika dokumentado en iuj medioj, la enketo ne povis sukcesi. Entute venis 126 respondoj, kio prezentas tro malgrandan materialon por pli fari ĝeneralojn. Tamen, ĉi tiel mankas, la enketo estas multilata instrua. Jen kelkaj konkludoj surbaze de la ricevitaj respondoj: El iuj vivantaj eminentuloj-esperantistoj, 98% estas viroj kaj 2% estas virinoj. Laŭ la ago 9% estas sub 40 jaroj, 24% estas inter 40-50 jaroj, 24% inter 50-60, 29% inter 60-70 kaj 14% estas pli ol 70-jara. Laŭ la profesio 60% estas universitataj profesoroj aŭ docentoj, 7% estas verkistoj aŭ artistoj, 8% politikistoj, 4% armea aŭ ekleziaj gravuloj, 21% aliaj eminentuloj. El tiuj eminentuloj nur 31% estas organizitaj membroj de la Esperanto-Movado, 16% estas aktivaj esperantistoj kaj 53% neaktivaj.

Surbaze de la respondoj oni povas fari ankau aliajn analizojn, ekzemple pri la fakoj de la eminentuloj, pri la libroj verkita de ili, pri la ordenoj kaj aliaj distingoj, kiujn ili ricevis, k.t.p. Tamen, la menciita analizo kaj ĉiuj aliaj analizoj devas esti prenitaj kun grandaj rezervoj pro la tro malgranda disponebla materialo. Unu rezulto, kiu certe fidele respegulas la faktan staton, estas la malalta procento de eminentuloj, organizita Esperanto-Movado. Nuntepe, kiam la Esperanto-Movado faras bonajn progresojn ĉie en la mondo kaj kiam la ĝenerala kultura nivelo altiĝas, estos pli facile aktivigi eminentajn personojn en la Esperanto-Movado. Sialice, ĉi tiu aktivigo donos grandan helpon al plia disvastigo de la lingvo kaj al kreo de pliaj kulturaj valoroj en ĝi. CED esprimas publikan dankon al ĉiuj landaj asocioj kaj unuopuloj, kiuj helpis en la enketo. Ĝi esprimas speciale koran dankon al sia kunlaborantino, s-ino Emilia Lapenna, pro sia verda granda laboro kaj faka gvidado de la enketo.

Sendis ĉe ne unu responduilon kaj reagis ĉe ne per sen asocioj).

Esperantista Ligo Izraelanda kaj Hindujo (ankorau Konsulta Komitato, Helena Esperanto-Asocio, donis helpon aŭ almenaŭ iel reagis Ĉeĥoslovaka Ligo por Nordameriko. El la nealigitaj asocioj Novzelando, Pola, Svisia, Urugvaja kaj Esperanto-Franca, Germana, Hispana, Jugoslavia, Norvega, cioj reagis: Brazilo, Brito, Bulgario, Danio, Finnio, Post pluraj petoj kaj admonoĵoj landaj asocioj reagoj: Brazilo, Brito, Bulgario, Danio, Finnio, vorto eminenta por la bezonoj de tiu ĉi statistiko.

Post pluraj petoj kaj admonoĵoj landaj asocioj reagoj: Brazilo, Brito, Bulgario, Danio, Finnio, vorto eminenta por la bezonoj de tiu ĉi statistiko. cioj estis tute klarej ankau rilate la difinon de la kaŭzo komence ian konfuzon, kvankam la instrukta misuzo de la vorto "eminenta", la demandoj de la Esperanto-Movado. Pro la lastatempa trouzo kaj kiuj fariĝis estarej nur en la kadroj de la ekstera Esperanto-Movado, kaj ne al personoj, kaj similaj, kiuj akiris renomon de eminenteco politikistojn, ekleziajn kaj armeajn altranulojn universitatajn profesorojn, verkistojn, artistojn, La statistiko rilate nur vere elstarajn fakulojn: emis fari tion.

La statistiko rilate nur vere elstarajn fakulojn: emis fari tion. nentulo, sed ankau por la vivantaj, se ili mem ne mem pleniĝi la demandojn por ĉiu mortinta eminentulo, sed ankau por la vivantaj, se ili mem ne estis eble doni precizaĵojn. La landaj asocioj povis tike. La respondoj povis esti proksimumaj, se ne La organiza plano estis aranĝita simple kaj praktice. La respondoj povis esti proksimumaj, se ne teritorio, kaj resenditaj ĉi al la komitato de CED. pondojn fare de la eminentuloj, logantaj sur ĉi en aprilo 1958 kun la peto, ke ili prizorgu la resklaraj instrukcioj, estis senditaj al la landaj asocioj La demandoj (Dem-EE-1958), provizitaj per donataj jenaj koncaj informoj:

Surbaze de la raporto de s-ino E. Lapenna estas kupo de tiuj, kiuj donis nentan helpon.

La demandoj (Dem-EE-1958), provizitaj per donataj jenaj koncaj informoj: kupo de tiuj, kiuj donis nentan helpon. povintaj kaj devintaj fariĝi, ne estas sia kupo, sed de la enketo ne estas tiel kontentigaj, kiel ili estus kun ĉiuj necesaj aldonaĵoj dokumentoj. Se la rezultoj kaj sendis al la oficejo de CED detalan raporton festado de la Zamenhof-jaro.

La demandoj (Dem-EE-1958), provizitaj per donataj jenaj koncaj informoj: kupo de tiuj, kiuj donis nentan helpon. povintaj kaj devintaj fariĝi, ne estas sia kupo, sed de la enketo ne estas tiel kontentigaj, kiel ili estus kun ĉiuj necesaj aldonaĵoj dokumentoj. Se la rezultoj kaj sendis al la oficejo de CED detalan raporton festado de la Zamenhof-jaro. CED entreprenis por helpi al kiel eble plej digna statistiko apartenis al tiuj multnombraj laboroj, kiujn Lapenna el Zagreb (Jugoslavia). Ankau tiu stato al sia kunlaborantino por statistikoj, s-ino Emilia Lapenna el Zagreb (Jugoslavia). Ankau tiu stato publiko vivo. Tiu gravan taskon CED transdonis entute elstarajn personojn sur la kampoj de scienco, edukado, kulturo, politiko, artoj kaj ĝenerale enketon, kiu koncernus ne nur lingvistojn, sed la sugeston, sed opiniis, ke estus utile fari pli larĝan esperantistoj, sed ankau al mortintaj. CED akceptis enketon devis rilate ne nur al vivantaj lingvistoj-taj lingvistoj, kiuj estis aŭ estas esperantistoj. La CED kun la sugesto kolekti informojn pri eminentuloj de 1958 s-ro E. Malmgren turnis sin al

Statistiko pri eminentaj fakuloj-esperantistoj

77, Grassmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.



# LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:  
Ivo Osibov  
Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio

## NOVAJ ORGANOJ DE TEJO

Dum la 15-a Internacia Junular-Kunveno okazinta ĉismere en Gdańsk, la Komitato elektis novajn organojn de TEJO. La Novan Estraron eniris:

Prezidanto: **Günther Becker**, Schlossbergstrasse 51, Blieskastel-Saar, Germanujo;

Vicprezidantoj: **Marek Pietrzak**, ĉe Pola E-Junularo, Garncarska 18, Gdańsk, Polujo; **Richard Reuchlin**, T 6/18 Mannheim, Germanujo;

Generala sekretario: **Nicola Minnaja**, Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italujo; Kasisto: **Adriaan Den Haan**, Athje-straat 2, Leiden, Nederlando;

Redaktoro: **Ivo Osibov**, Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio;

Estraranoj: **Nikolaj Nikolov**, ĉe Junulara sekcio de la Bulgara E-Asocio, poŝtkesto 44, Sofia, Bulgarujo; **Heinrich Reiter**, Sonnwendgasse 32, Wien X, Aŭstrujo.

La Arbitracia tribunalo konsistas el: **Wim Bruynesteyn** (Nederlando), **Anastas Ĉalakov** (Bulgarujo), **Vincenzo Di Nubila** (Italujo), **Ljubiša Jevtić** (Jugoslavio) kaj **Gerhard Ziegler** (Germanujo).

Ankaŭ estas elektitaj komisiitoj: por disvastigo de Esperanto inter la ekster-eŭropa junularo **Lucien Piétri** (Afriko) kaj **Kwaŭlat Kho** (Azio), pri junularaj vojaĝoj **Hans Bakker**, filo, kaj pri interŝanĝo de junularaj grupoj **Svobodan Zlatnar**.

## Esperantista Renkontiĝo dum la VII-a Monda Junulara Festivalo

Dum la VII-a Festivalo, kiu okazis de la 26-a de Julio ĝis la 4-a de Aŭgusto en Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio, ankaŭ okazis ree Esperantista Renkontiĝo, kies prezidanto estis la TEJO-estrarano **Heinrich Reiter**. De la nuna TEJO-estraro krome estis reprezentita s-ro **Nikolaj Nikolov**, prezidanto de la Bulgara Esperanto Junularo. Post streĉaj antaŭlaboroj de la festivala Komitato kiel ankaŭ de la Aŭstria kaj Bulgara Esperanto-Junularoj, la Esperantista Renkontiĝo ree fariĝis bona sukceso. Partoprenis gamikoj el 12 landoj en kvar kontinentoj (mankis Afriko). El la riĉa programo mi mencias nur la solenan malfermon kun festparolado de inĝ. **Simeon Simeonov** el Sofio, la prezenton de kvar filmoj en Esperanto, la gajan vesperon k.a. En laborkunsido ni interalie decidis jenan

### REZOLUCION:

1. Nuntempe la defendo de la paco

en la tuta mondo estas la plej grava tasko de la junularo. La plivastigo de la kulturaj, profesiaj, turistaj kaj personaj kontaktoj de la diversnaciaj gejunuloj kontribuas al la paca kunvivado de la popoloj.

2. Esperanto estas facila kaj neŭtrala rimedo por efektiviĝo de rektaj kaj senperaj kontaktoj inter la diversnaciaj gejunuloj. Pro tio ni apelacias al ĉiuj junularaj internaciaj kaj naciaj organizaĵoj helpi la disvastigon de Esperanto en la junularaj medioj.

3. Por forigo de lingvaj baroj dum la estontaj festivaloj oni devas prizorgi grandskalan aplikadon de Esperanto.

4. Ni proponas al Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kunlabori pli aktive kun ĉiuj internaciaj kaj naciaj junularaj organizaĵoj rilate la disvastigo kaj apliko de Esperanto, plifaciligado de internaciaj junularaj rilatoj k.s.

La detalan programon kaj ĉiujn festival-aktualajn informojn oni povis legi en la jam tradicia antaŭfestivala gazeto "Esperanto en la FESTIVALO", kiun eldonas la Bulgara TEJO-Sekcio. La por ni esperantistoj de la festival-komitato luitaj salonoj kaj kinejo estis grandegaj kaj modernaj, la en Esperanto presitaj invitiloj plaĉaj. Geinteresuloj pri kunlaboro en venontaj festivaloj aŭ instigantoj bonvolu interrilati kun la festivalkomisiito de TEJO, s-ro **Nikolaj Nikolov**, Poŝtkesto 44, Sofio, Bulgario. Ni esperu, ke la venonta festivalo estos ankoraŭ multe pli granda sukceso por Esperanto.

*Heinrich Reiter*

## INTERNACIA SEMINARIO DE LA GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

Inter la 27-a de Decembro 1959 kaj la 2-a de Januaro 1960. Germana Esperanto-Junularo organizos tradician Internacian Seminarion, ĉiĵoj sub la titolo "Aziaj kaj Afrika problemoj". La Seminario okazos en la junulargastejo de Limburg/Lahn sub la honora protektado de la urbestro, s-ro **Josef Schneider**.

La programo konsistas el prelegoj kaj sonbendaj raportoj de diverslandaj esperantistoj pri la seminaria temaro, el Zamenhofa soleno, diskuto pri la esperantista junularo, film-kaj lumbild-prezentadoj, surbendigo de raportoj pri la seminario, ekskursoj kaj silvestra balo.

Pro ŝtata subvencio la prezo (enhavanta loĝadon kaj ĉiujn manĝojn) estos nur 40 GM por gepartoprenantoj

malpli ol 25-jaraj kaj 50 GM por pli ol 25-jaraj. Parto de la vojaĝkostoj (ĝenerale 50%) sur la linioj de la Germana Federacia Fervojo estos repagata al la gepartoprenantoj malpli ol 25-jaraj.

Por plifaciligi organizan laboron partoprenantoj estas petataj aliĝi kiel eble plej baldaŭ ĝirante la antaŭpagon de 10 GM al la konto n-ro 9750 ĉe Stadtsparkasse Neustadt-Weinstrasse por Deutsche Esperanto-Jugend. Aliĝilojn oni povas ricevi de la Germana Esperanto-Junularo, Mannheim, T 6/18, Germanujo.

## 5-a Internacia Junulara Skiferio de TEJO

### 3-a Internacia Junulara Skikonkurso de TEJO

#### 1-a Eŭropa Vintro-Universitato

La skiferio kun skikonkurso kaj Vintro-Universitato okazos de la 28-a de Decembro 59-a ĝis la 5-a de Januaro 60, en la pensio "Reithof", **Filzmoos**, Salzburg, Aŭstrio. La aranĝo komenciĝos per la vespermanĝo kaj finiĝos per la tagmanĝo (dek plenaj tagoj!).

La prezo por loĝado kaj manĝado estas por la tuta tempo 480.— aŭstr. ŝilingoj, por ok plenaj tagoj 400.— ŝilingoj. Pli longa resto eblos je reduktita prezo. Aliĝojn ni nur povos akcepti ĝis la unua de decembro. Laŭeble ĉiu junulara Esperanto-klubo (grupo) sendu reprezetant-in-on. Gejunuloj el pluraj landoj jam aliĝis. Antaŭpagon (180.— ŝil), informpetojn (kun respond-kuponon) kaj aliĝojn direktu al: **Heinrich Reiter**, WIEN X., Sonnwendg. 32/2/33, Aŭstrio.

Gejunuloj (*teen- twenty- and thirty-agers*), ne gravas, ĉu Vi estas ĉampionoj aŭ kompletaj novkomencantoj en la skiado, Vi havos multajn eblojn por agrable pasigi la tempon. Venu, Vi certe estos kontentaj!

*H. R.*

## SEKVINDA EKZEMPLO

Diversaj internaciaj kunvenoj, konferencoj, kongresoj kaj aliaj aranĝoj estas lokoj de unuaranga graveco por nia agado. Bonegan ekzemplon donis ĉismere la "Esperanto-Junularo de Berlin".

En Berlin okazis tendumado de la "Internacio de socialista junularo" (IUSY), kiun partoprenis ĉirkaŭ 5.000 gejunuloj el 33 landoj. La Esperanto-Junularo de Berlin bone eluzis la sancon informante pri Esperanto dum ĉiuj 10 tagoj en la tendaro. Meze de la tendaro ĝi sukcesis akiri grandan tendon por organizi malgrandan ekspozicion, disdonadi varbilojn kaj vortarojn kaj diskuti pri la problemoj de internacia lingvo. Entute estas disdonitaj 5.000 kvinlingvaj varbiloj speciale eldonitaj por ĉi-okazo, 3.000 seslingvaj faldfolioj kaj alia materialo. La laboro de la berlinaj junuloj vekis grandan intereson inter la partoprenantoj, vizitantoj kaj gazetaro.



Japana komitato por la organizo de Zamenhofa Jubileo aranĝis Esperantan libraron kun pli ol 160 ekz., kiujn oni elektis ĉefe el la postmilitaj tutmondaj eldonaĵoj. La migrantan ekspozicion efektivigis la japana komitato por la memoro al 100-jara Zamenhofa Jubileo. La unua prezento de la ekspozicio okazis en Tokio en junio, kaj la vizitantoj (neesperantistoj) superis 2000. Inter ili troviĝis multaj kompetentaj personoj — ankaŭ sciencistoj. Pluraj grandaj ĵurnaloj (unu el ili, Asahi) informis pri la okazaĵo, kaj NHK-Televido uzis la okazon havi intervjuon kun Konĵi Ossaka, prez. de Japana Komitato por la Zamenhof Jubileo.

#### Jugoslavio

Populara revuo enkondukas Esperanto-kurson okaze de Zamenhof-Jaro. La redakcio de populara kroata revuo "SLOGA" (Konkordo) decidis okaze de la Zamenhof-Jaro denove aperigadi la kurson de Esperanto por la memlernantoj. La revuo siatempo aperigis tian kurson, kaj la kurso vekis intereson ĉe vilaĝanoj, kiuj estas grandparte legantoj de la populara revuo. Nun denove dank' al s-ro Ĝiunio, kiu sukcesis interesigi la novan redaktoron J. Vrhovac por Esperanto, reaperos regule ĉiumonate la Esperanto-kurso. Enkonduka priesperanta artikolo verkita de Ĝiunio jam aperis en la 6-a kaj 7-a numero de la menciita revuo.

#### Nederlando

Arnhem Kunlabor-komitato sukcesis aranĝi Esperanto-kurson en la Arnhema eldono de "Het Vrije Volk". Ĝis fino de septembro sin anoncis pli ol 200 partoprenantoj, kaj la nombro ĉiutage kreskas. La unua leciono aperos en la numero de la 8-a de oktobro.

La tiu ĉi jara Zamenhof-vespero, organizota de la Kunlaborkomitato en Arnhem, okazos mardo la 8-an de decembro en salono de "Royal". En ĝi kantos ĥoro de la Instituto por Laborista Klerigado, kaj prelegos prof. d-ro Ivo Lapenna, la ĝenerala sekretario de

U.E.A. kaj la sekretario de la Internacia Komitato por la Zamenhof-jaro, pri "La genio de d-ro L. L. Zamenhof". Ĉiuj esperantistoj estos bonvenaj.

#### New Zealand

En New Zealand okazis nova oficiala aprobo pri instruado de Esperanto en la elementaj lernejoj. La menciitaj klasoj I kaj II troviĝas aŭ en elementa aŭ en postelementa lernejo kaj enhavas infanojn 11-12 jarajn. La aprobo aperis en nova programo pri la angla lingvo: "... precipe estas sugestate ke en klasoj I kaj II estos pluraj infanoj, kiuj pro apartaj kapableco kaj interesoj meritas pluajn okazojn por studi: 1.... 2.... alian lingvon eks. la francan, la maorian aŭ Esperanton. Okazon por studi alian lingvon oni povas ofte doni per lerneja klubo. Grave estas emfazi, ke tiajn klubojn aŭ klasojn gvidas instruistoj kompetentaj pri la lingvo. La lingvostudado probable estos daŭrigata en postelementa lernejo".

#### Usono

En la komenco de aŭgusto okazis en "Green Acre" Esperanto-semajno por la Bahaanoj kun gastoj. Ceestis pli ol 150 personoj de ĉiuj partoj de la lando kaj de Kanado. Ĉiu-vespere estis kulturaj programoj, ekz. dum iu vespero oni diskutis la funkciadon de UN, kaj ĉie sur la muroj en la kunvenejo pendis UNESKO-afiŝoj Esperantlingvaj. S-ro Gonzalez faris bonegan paroladon pri la internacia lingvo.

#### Svislando

Okulisto, d-ro Alfred Bader, Bazelo, informis la 13-an de septembro en prelego en Thun siajn okulkuracistajn kolegojn pri Esperanto por servi al la Zamenhof-jubilea jaro. Liaj helpiloj estis: foto de Zamenhof, poŝtkarto de 1906 de Zamenhof, kelkaj libroj, i.a. kongreslibro de la 44-a U.K. 1959. Fine la ĉeestantoj sendis saluttelegramon por "Prezidanto de UEA, d-ro Giorgio Canuto, direktoro de la Jurmedicina Instituto en Torino.

## Esperantista Vivo

#### Naskiĝo

Gesinjoroj Soňa kaj Vladislav Pečinka, Lázně Jeseník, Ĉeĥoslovakio anoncas la naskiĝon de sia filineto la 15-an de julio 1959. La filineto, Vladislava, estas denaska esperantistino. Gesinjoroj Margaret kaj Derrick Faux, Wheathill-Bruderhof, Bridgnorth anoncas la naskiĝon de sia fileto, Julian Roy, naskita la 26-an de aŭgusto 1959.

#### Geedziĝo

BADSTIEBER - FASTL. Je Pentekosto geedziĝis en Salzburg, Aŭstrujo, f-ino Marianne Fastl kaj s-ro Hans Badstieber.

#### Memortagoj

S-ro Michl Ehbauer, München, konata poeto kaj humoristo, longjara membro-abonanto de UEA, festis la datrevenon de sia 60-a naskiĝtago 30 jaroj kiel esperantistino.

★

En oktobro s-ino Edwarda Kamińska, Gdansk-Wrzeszcz, Pollando, festis la tagon, ke ŝi antaŭ 30 jaroj en la Varsovia Universitato ricevis el la manoj de prof. Otto Bujwid la superan Esperanto-diplomon. De tiu tempo ŝi vigle partoprenas en la Esperantomovado en Pollando kaj gvidis multajn kursojn. Post la mondmilito ŝi estis dum du jaroj en germana koncentrejo, kie ŝi ege suferis. Felice ŝi estis liberigata de la Sveda Ruĝa Kruco. Alveninte en Svedujon ŝi prelegis tie dum 8 monatoj pri la restado en la koncentrejo kaj verkis libreton "En la faŭko de la morto".

S-ro Ivan H. Krestanof, Sofia, Bulgarujo, festis la 28-an de oktobro sian 70-jaran naskiĝtagon.

## Nekrologo

Carles Riba, la eminenta kataluna poeto kaj lingvisto, Universitata profesoro, kiu akceptis partopreni la Internacian Komitaton por la Zamenhof-jaro, ĵus forpasis. Li estis nur 65-jaraĝa, kaj prezidis la Filologian fakon de l'Institut d'Estudis Catalans kaj direktis la grandan kolekton de klasikaj Grekaj kaj Latinaj verkaĵoj, "Fundació Bernat Metge", tradukataj en katalunan lingvon. Al lia vidvino, ankaŭ fama poetino, kaj gefiloj, plej sinceran kondolencan.

★

Mortis la fidela esperantisto, longjara membro-abonanto de UEA, s-ro Georg Aschl, München.

★

Kun profunda malĝojo la esperantistoj en Kolarovgrad sciigas, ke la 26-an de julio mortis en Sofia la amata, ŝatata kaj honorata s-ro Ilija Silvestriev Pečkov, 76 jarojn aĝa. Li estis pioniro de la bulgara Esperantomovado kaj fondinto de la loka Esperanto Societo "Vekiĝo".



## Zamenhof Memortabulo

En Wiener Neustadt, Aŭstrujo, estis inaŭgurata bela Esperanto parketo kaj en ĝi, la 18-an de majo 1959, oni inaŭguris sole ankaŭ Zamenhof memortabulon.



# Belataj Konkuroj 1959

anco : Originala poezio

Unua Premio

kovreti mian tombon mutan,  
kvaŝan ĝi plorus per negaj larmoj.

Sandor Csaszar

## Intimo

Kontraŭ mura grizo

de l' eta ĝarden' :  
orŝava citizo.

Karesas blanka man  
abandon floran

en orpluva ban'.

Vi ĝoju, kara,

pro riĉa vivoplen'

en helmo solidara !

Sed ŝiosu ĉiujn pordojn bare,

kaŭ metu dogon ĉe la sojlo :

Ekstere sur ĉeval' de Trojo

rajdas perfide voĉ' najbara.

Albert Samyn

## NOVA TALENTO

Laŭ malnovgreka-latina versmezuro  
kiel ĉe la poemo : "Printempaj burĝonoj"

## Kun neg' argenta paŝas la vintro

Ne serĉu ridon, ĝojon sur mia vang',  
malbriliaj ĝis miaj okuloj jam,

la flam' de mia kor' flagretas,  
ĝia ardenta somer' forĝis.

Ankoraŭ logis ankau hieraŭ min  
Amor' kaj plektis koron La mian per

sangruĝaj rozoj, mia amo

sune brilegis en mia esto.

Mil steloj ardis supre en nokt' kaj vi

ĉe pala lum' de l' luno ĵuradis, ke

eterna restos mia suno,  
tamen vi baldaŭ ĵurrompis ace.

Kun neg' argenta paŝas la vintro jen  
konsoli mian vundon doloran kaj

Ne serĉu ridon, ĝojon sur mia vang',  
vualo nigra kovris malĝaje ĝin,

autuno flava kaŝis mian  
koron kun kantoj flustrant' aj kune.

## Parolas Maljunulo

de Eriĉ Kästner

Infano estis mi. Jes, kiel vi.

Mi estis vir'. Kaj maljunulo nune.

Forpasis temp'. Ankoraŭ vivas mi.

Volonte mi forgesus ĉion kune.

Infano kiel vi. Nun elĉerpite.

Tro longa viv' fariĝas fine aĉa.

Se morto venus, bone, aprobite.

Mi estas laca ! Alinome : saĝa.

Mi vidis multon en la mondatro.

Infano estis mi. Jes, kiel vi.

Mi estis viro kiel via patro.

Plejofte malvaloris, kredas mi.

Por vi ja estus rakontinda multo,

Ankoraŭ nekonata historie.

Vi serĉus en la libroj sen rezulto.

Car la esenca parto mankas tie.

Milito estis. Kaj ni spertis ĝin.

Sufero venis. Kaj ni spertis : kial.

La grandaj trompoj ne plu trompis nin.

Fantomo ni ekkonsciigis : tial.

Esperis ni. Sed vana la espero.

Malforta stelo restis la raci.

La posteuloj pensis ĝin ĥimero.

La posteuloj lernis ne de ni.

Horst Michling

# Novaj Libroj

Duope ricevetajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

\*) ricevebla ĉe U.E.A.

**MEZE EN GERMANUJO — MEZE EN LA 20-a JARCENTO.** Riĉe ilustrita libro 80-paĝa en la germana lingvo kun 16-paĝa traduko en Esperanto, eldonita kaj senpage havebla ĉe la Federacia Ministerio por Tutgermanaj Demandoj (Bundesministerium für gesamtdeutsche Fragen) en Bonn.

La interesa libro prezentas per teksto kaj trafaj fotoj la historion de la zoniĝo, 1300 kilometrojn longa, kiun starigis la komunista reĝimo en Orienta Germanujo laŭlonge de la demarkacia linio inter la zonoj, okupitaj de Sovetunio unuflanke kaj la tri okcidentaj potencoj aliflanke. La du partojn de Germanujo unu de la alia disigas hodiaŭ pikildratoj, barieroj, gardoturoj: barita distrikto plurajn kilometrojn profunda, gardata de malgranda armeo nomita en Orienta Germanujo "la limpolico".

La fotoj ilustras per muta elokventeco la sekvojn de la artefarita divido de Germanujo: la detruon de regionaj kaj lokaj ekonomiaj unuoj kaj la paralizon de trafiko kaj komerco en la zonaj randregionoj. Trabaj obstakloj, dratoj, fosoj k.s. fermis fervojajn liniojn kaj baras vojojn kaj ŝoseojn, kiuj neuzataj jam ruiniĝas kaj kovriĝas per plantaĵoj.

La libro informas, ke la komunista reĝimo en Orienta Germanujo motivigis la starigon de tiu bariero inter oriento kaj okcidento per la neceso de konstanta protekto kontraŭ agentoj, spionoj kaj sabotistoj en okcidenta Eŭropo. Konsiderante tamen kiom da homoj fuĝas okcidenten ĉiujare, oni ne povas ne demandi, ĉu ĉiuj barajoj, ĉiuj observejoj, ĉiuj gardoturoj ne ĉefe direktiĝas kontraŭ la forkurado kaj elmiĝado sekreta el Orienta Germanujo, kies politika sistemo fariĝis netolerebla.

Senkonsidere pri tio, kiel oni respondas al la farita demando, la recenzita libro kun ĝia fidinda Esperanto-traduko estas tre rimarkinda el la vidpunkto de oficiala aplikado de la Internacia Lingvo, kaj ankaŭ ĉi tiu libro atestas pri la kreskanta signifo de Esperanto por informaj celoj de ŝtataj aŭtoritatoj.

Eskil Svane

**LERNOLIBRO DE ESPERANTO.** De L. Nimó; presis E. Moreno Medrano, Entenza 131, Barcelona. Prezo: -.65

pesetoj plus sendkosto.

La sobre impona ekstero de tiu ĉi volumo — ore literumita ŝagrino — sugestias kleran enhavon, la antaŭparolo plifortigas tiun impreson, kaj la lecionoj konfirmas ĝin. Sekve, almenaŭ la hispanoj nun posedas verkon, kiun ili povas prezenti al ĉiu eĉ plej erudicia filistro tute ne devante senti humiliĝon antaŭ ties eventuala supereco, ĉar tiu ĉi libro nenion cedas al antaŭjuĝemaj ŝercantoj, ĉu en sinteno, ĉu en prezento.

La antaŭparolo atentigas, ke la celo de la verko estas "prezenti koncize la mirindan kreaĵon filologan, kiu estas Esperanto", kaj anticipe neniigas facilanimajn argumentojn pri la artefariteco de Esperanto per la analogo de kulturita rozo, kiu estas tamen natura floro. Fine, la aŭtoro atentigas, ke la mirinda simpleco de la lingvo ne signifas, ke oni povas ekkoni ĝin sen iu ajn peno.

Tiu ĉi prudenta kaj science serioza sinteno speguliĝas en la lecionoj mem, kiuj komenciĝinte per prononcoleciono, kiu utiligas tuj vortaron lernendan, provas liveri al la studento plenan, ne tro koncizigitan, scion pri la lingvo per ŝtupoj nur grade kondukantaj al pli malfacilaj niveloj.

La tradiciaj ĉikanoj pri verkoj agnoskitaj kiel kompetentaj estas domaĝaj, sed mi ne povas ne scivoli, ĉu la uzo de 'preferus' en

"Mi preferus se vi venus" apud frazoj, kiaj

"Mi estus feliĉa se vi venus"

ne estas konfuza por studento, kiu jam kutimiĝis al "ke" kaj la imperativo ĉe verboj, kiaj "atendas" kaj "deziras", precipe kiam la gepatra lingvo uzas "que" plus subjunktivo sendistinge.

Lerte kompilita korelativa tabelo subtenata de koloneca "I" staras antaŭ la lecionoj, kiel la "skeletono de la lingvo".

J. F.

**EKZISTENCIALISTAJ HEROOJ EN LA LITERATURA VERKARO DE J. P. SARTRE\***, paralelaj tekstoj esp-a kaj franca ambaŭ faritaj de Colette Llech-Walter, kun antaŭparolo de Prof. Giorgio Canuto. Eldonis Centre Culturel Espérantiste, 5, Quai Vauban, Perpignan (Pyrénées-Orientales), Francujo. Havebla ĉe "UEF-Esperanto", 34, Rue de Chabrol, Paris 10-ème. Prezo:

150 fr. fr. aŭ 4 st. aŭ 4 resp.-kup. 71 paĝoj.

Dum la Universala Esperanto-Kongreso en Marseille, f-ino Colette Llech-Walter, filino de s-ro René Llech-Walter, faris prelegon pri la filozofio ekzistencialista, prenante kiel reprezentanton de tiu skolo la francan verkiston Jean-Paul Sartre.

Jen aperis la raporto de f-ino L. W. en du lingvoj. Dekstre oni legas la francan tekston kaj maldekstre la saman tekston en Esperanto.

Bedaŭrinde la Esp-a teksto estas maleleganta, tro aspektas tradukita, kaj havas eĉ rektajn erarojn gramatikajn, ekzemple erare anstataŭas akuzativo nominativon (p. 30, en la suba citaĵo), nominativo akuzativon (pp. 12, 40, 42), preterito prezencon (pp. 14, 44), adverbo adjektivon (pp. 56, 58).

Sed kvankam la malelegantaĵoj kaj la eraroj iom agacas la leganton, la teksto ja estas komprenebla preskaŭ ĉie. Tamen, sen helpo de la franca paralelo oni apenaŭ komprenus ekz. jenan frazon:

"Li rekunigas tiamaniere, la sintenadon de multaj homoj kiujn estas perfekte persvadataj pri la graveco de sia misio en la socio" (p. 30). La senco estas: "Tiamaniere li akceptas la sintenadon de multaj homoj kiuj estas perfekte pesvaditaj,....".

Estas tre domaĝe ke la Esp-a teksto havas tiajn makulojn, ĉar la enhavo estas vere bona. F-ino L.-W. sukcese atingis sian celon, "esprimi kelkajn ĉefajn ideojn, kiuj tute speciale impresas dum la legado de la Sartra verkaro" (p. 10). Per ekzemploj elektitaj el la beletraj verkoj de Sartre ŝi montras kial Sartre nomas sian filozofion humanismo, kaj kiel laŭ Sartre la plej multaj homoj estas "malliberaj" kaj kiel kelkaj homoj klopodas iĝi liberaj kaj trovi vivon aŭtentike homan. La broŝuro de f-ino L.-W. estas sendube unu el la plej bonaj helpiloj por tiu kiu deziras ekkoni la filozofion de Sartre.

La verkintino diras (p. 14 kaj 15) ke la dana filozofo Søren Kierkegaard uzis unua la terminon "Ekzistencialismo". Sed en kiu loko? En la verko kiu precipe inspiris la modernajn ekzistencialistojn, "Fina Nescienca Postskribo" (1846), S.K. distingis inter pensanto (kaj pensado) ekzistanta, subjektiva, kaj pensanto (kaj pensado) spekulativa, objektiva, kaj en tiu verko kaj aliaj li tre ofte uzas la verbon *existere* 'ekzisti', la substantivon *Existens* 'ekzistado' (kaj tridekon da diversaj kunmetaĵoj kun ĝi), kaj ankaŭ la adjektivon *existentiel* 'ekzistada'; sed mi dubas ĉu S.K. uzis ankaŭ la derivitan substantivon *Existentialisme* (eble ĝin uzas liaj francaj tradukintoj, kiuj foje tradukas la partikipon signifantan 'ekzistanta' per *existentialiste*, vorto verŝajne netrovebla en la dana originalo). Sed eble f-ino L.-W. povas indiki la lokon kie S.K. uzas ĝin. Laŭ



**LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1959**

Stato je la 30-a de septembro  
Konkurso I

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Hispanujo	1999	2648	132.46
2. Belgujo	1480	1912	129.18
3. Pollando	6635	8555	128.93
4. Finnlando	1935	2445	126.35
5. Jugoslavio	5690	7070	124.25
6. Usono	2816	3210	113.99
7. Britujo	6093	6527	107.12
8. Svislando	1950	2035	104.35
9. Svedujo	6420	6520	101.55
10. Nederlando	5119	5083	99.30
11. Francujo	7066	6961	98.51
12. Norvegujo	1991	1905	95.68
13. Italujo	3980	3355	84.30

14. Danlando	2639	2160	81.85
15. Germanujo	6951	5365	77.18
16. Brazilo	8255	3374	40.87

Konkurso II

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Japanujo	1150	2390	207.82
2. Kanado	435	605	139.08
3. Sudafriko	215	225	104.65
4. Argentino	615	643	104.55
5. Aŭstrujo	1360	1365	100.36
6. Islando	270	270	100.00
7. Izraelo	255	240	94.12
8. Portugalujo	615	550	89.43
9. Novzelando	878	760	86.56
10. Urugvajo	325	255	78.46
11. Aŭstralio	1280	1066	78.20
12. Maroko	457	256	56.02

Ciu larĝe pasu 100% en la Zamenhof-Jaro!

La 4-a Kongreseto estis sub la signo: "Multe da ĝojo kaj da ludo!" La devizo estas tre taŭga, sed ĉefe por infanoj ĝis 8 aŭ 9 jaroj. Estus pli bone estonte dividi la Kongreseton en du grupojn kun du programoj: unu por geetuloj kaj alia por geknabetoj pli aĝaj. Por la malpli junaj infanoj estas oportune prepari ne nur multe da distraĵoj, sed ankaŭ laborhorojn en freŝa aero. Al la infanaj kongresetoj devas esti pli severe akceptataj nur infanoj, kiuj bone parolas Esperanton. La uzo de la Internacia Lingvo ĉe la infanoj estas la plej konvinka propagando kaj la plej rezultodona metodo de informado.

**La 32-a kongreso de S.A.T.**

okazis ĉijare en Dortmund, 1-7-a de aŭgusto, kaj ĝin partoprenis 550 geesperantistoj el 14 landoj. La tuta semajno havis sukceson, sed speciale la malfermo, kiu estis vere solena kun belaj muzikaĵoj de i.a. "Dortmunda popolĥoro" kaj kantoj de la "Mozart-ĥoro". La plej bonan impreson tamen faris la ĉefurbestro, SAT-ano s-ro Keuning, kiu faris sian bonvenigan paroladon senmanuskripte, elokvente parolante Esperanton.

Lunde komenciĝis la laborkunsidoj, kiuj daŭris dum la tuta semajno. Krom la laborkunsidoj okazis multaj fak-kaj frakcikunvenoj.

La adiaŭa vespero estis same modela kiel la aliaj arangoj, sed kun iom pli serioza programo, kaj oni disigis per la vortoj: "Ĝis revido venontjare en Aarhus, Danlando".

**BELARTO**  
ĉu jam en via ŝranko?

**U.E.A. KANDIDATO POR NOBELPREMIO**

La Sekretariaton de la I.O.K. ĵus atingis informo, ke, okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, Sveda Parlamento, s-ro Einar Dahl proponis al la Nobel-Komitato, ke Universala Esperanto-Asocio ricevu la pacpremion.

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de oktobro 1959

N-ro 320

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de septembro 1958:

	1958	1959
Asociaj membroj	13026	16118
Individuaj membroj		
MJ	744	839
MA	4800	5256
MS	525	512
Pat.	5	7
DM	307	339
HM	47	45
JMJ	15	29
JMA	96	177
	<b>6539</b>	<b>7204</b>
	<b>19565</b>	<b>23322</b>

**DELEGITOJ**

**Aŭstrujo**  
Ernstbrunn (Niederösterreich)  
D: vakas.  
**Belgujo**  
Ruisbroek (Brabant) D: S-ro Maurice Charles Monnaers, ŝtatoficisto, Gieterijstraat 82.  
**Sint-Pieters-Leeuw** (Brabant)  
D: vakas.  
**Ĉeĥoslovakujo**  
Bratislava (Slovensko) FD (lingvistiko kaj eldonaj problemoj): D-rino

Magda Ŝaturova, redaktorino, Ĉsl. Armády 40.  
**Ĉervená Voda** (Morava) D: S-ro Josef Otta, negoczorganto, Ĉervená Voda 165, okr. Zábřeh.  
FD (kooperativismo): La D.  
FD (kuirarto): La D.  
**Karviná 2-Doly** D: vakas.  
**Praha** (Ĉeĥy) FD (inventajoj kaj patentoj): S-ro Jiří M. Havlík, patent-technikisto/disponisto, Plamínkové 12.  
**Rumburk** (Ĉeĥy) D: S-ro Jan Zemek, em. ĉefinspektoro de fervojo, strato

**ANONCETOJ**

kun junuloj de tuta mondo. Certe respondos. S-ro Vladimir Kozlov, Kubanskaja 3, Jalta, Krimeo, Soviet-unio.

**Esperanto-Civito**, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo. Fondaĵo (por aĉeti domon) staras je 12 pundoj. Sajne pasis tra la pordeĵo de Britujo tiun ĉi someron nur unu Esperantisto! Anoncu vin al S-ro Dobra Soleo.

**Ints Cate** tutkore animiŝe dankas tutmondan esperantistaron pro mirindan amikecplenan vortojn, kiujn la esperantistaro dediĉis al li okaze de lia 50-jara esperantisteco!

**Konsilio** petas S-ro Mahalingam, A 178, Defence Colony, New Delhi, Hindujo, ĉu violono kun nomo "Antonius Stradivarius Cremonensis", faciebat anno 1740" estas valora.

**Gesamdeanoj de l' tntmundo**, kiuj interesas pri la rusa lingvo aŭ jam studadas ĝin, leterkontaktilgu kun rusa esperantisto: A. K. Savostanov, P.K. 466, Moskva, Centr. U.S.S.R. Li estas preta laŭeble helpi.

**Fino Aaf Tebbenhof**, Narcissstraat 78, Groningen, Nederlando, petas ĝekorespondantojn turni sian atenton al nova adreso. Seriozaj skribaĵoj estos resendataj. Pri propagando kaj movado korespondus nur kun oteremaj kaj vere seriozaj aktivuloj. Kovarez, Sverige, Lund, 212.

**Ceta lernanto** 15-jara, kolektanto de postmarkoj, pk., unutagaĵ kovertoj kaj alumeetiketoj deziras korespondi kun tutmondo. Franĵiteĉk Dvofak, Albrecht-tice n/vet. 88, Cehoslovakio.

**La Ludo-Cambro** serĉas junulinojn por masturma laboro kaj Esperanto-korespondi pri fotografataro kaj pri instruado. Restado (veĝetara) kaj postmono aŭ salaĵo laŭ kvalifikoj. Bon-volu skribi al: Karen Bjørnsby, Hartmannsvej 23, Hellerup, Kopenhago, Danlando.

**Radio**

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglanther, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

**Radio Roma**. 3-XI, Tra la literaturo; 6-XI, la semajno de la mortintoj en la penso de la vivantoj; 10-XI, Italujo kaj Schiller; 13-XI, Leterkesto kaj biblio-gratio; 17-XI, Italaĵ kanzonoj en Esperanto; 20-XI, Novaĵoj el Italujo; 24-XI, Itala belarta urbo Viterbo; 27-XI, la sesa jarcento de la Itala literaturo; krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

**Radio Zagreb**. 5-XI, Mozaike-kurtozaĵoj; 12-XI, Promeno tra Istrio, la norda Adriaĵiko; 19-XI, Radio-dramo: La plej granda malamikoj; 26-XI, Novaĵoj el la movado kaj responde al la korespondantoj; 3-XII, Recenzoj pri la novaĵ libroj; 10-XII, Memoro al la naskiĝtago de la Majstro.

**FONDADO ZAMENHOFF**

Antaŭa sumo 16,758,30 gid.

Fino Lila Teixeira 28,52 gid, Brazilo; Brita Asocio Blinda Esp. 10,60 gid, Zilio; Brita Fed. 34,43 gid, Halifax Esp. Yorks, Fed. 31,80 gid, N. R. Smith 19,30 gid, Socy. 31,80 gid, N. R. Smith 19,30 gid, Britujo; F-ino Stas 3,85 gid, Prof. Beau 38,50 gid, S-ro Couris 3,85 gid, Fran- cujo, Fr. Kraus 14,44 gid, Germanujo, J. Hoekstra 1— gid, "Busmano" 2,50 gid.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon. M. H. Vermaas, Direktorio C.O.

Donacu unu mlilonon — aŭ pli! — de viaĵ jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo!

Entute 17,020,62 gid. je 1.10.1959.

Schothorst 1,50 gid., Nederlando.

gid., N.N. en V. 75— gid., Nanny

**Londona gastejo**, aĝrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 s. 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdatur.

Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warring-ton Crescent, LONDON W. 9, Britujo.

Telefono CUNNINGHAM 4487.

**Ibra Radio**, kin sendas el Tangerang, Atriko, havas Esperantan programon la lastan marĉon de ĉiu monato je 20.15 horo mezeuropo tempo. Ondlongoj 32.5 m, 26.1 m kaj 1.7 m. Ibra sendas en multaj lingvoj. Aŭskultu kaj skribu en Esperanto al Ibra Radio, Stock-holm, Svedujo.

**Cu trovigas** inter la lertaj Esp-istoj angla lingvanoj kiuj scipovas la "Kritisan Sciencon" kaj eble interesigis pri eldonado de Esp. traduko de ĝia in-struĵkuro? Jam ekzistas unu traduko aprobita de plej eminentaj Esp-istoj. Interesatoj bonvolu kontaktil: John F. Clewe, 1234 West 40th Place, Los Angeles 37, California, U.S.A.

**Filatelisto**: Hispana humordeseĝnisto deziras ricevi humortajn revuojn kun ilustritaj spritaĵoj el ĉiuj landoj, en kiuj aĝn lingvo. Egala valoron mi pagos per serioj de neuzitaj hispanaj postmarkoj. S-ro Jaime Beltran, str. Pro-venza 357, Barcelona, Hispanujo. Ĉi tiu anonceto validas ĉiam.

**Vitolojn** (cigaretilkeĉojn) kaj uzitajn postmarkojn serioze interŝanĝadas kvanton kontraŭ kvanto: Kooperativo "La Sabadellense" (Vitololoĵa kaj Ri-latela Rondo) Str. General Mola 99, Sabadell, Hispanujo.

**Interŝanĝi memloĵitajn** amatorbildojn, korespondi pri fotografataro kaj pri aliaj artbrancaĵoj deziras Franc Vetric, Kersnikova 6, Maribor, Jugoslavio.

**25-jara lralio**, deziras korespondi kaj interŝanĝi postmarkojn, filmkartojn

**Palackeho** 23 vilao Esperanto. FD (lingvoj): La D. FD (tutismo): La D.

**Le Mans** (Sarthe) D: S-ro Bernard Michel, teknika kontrolisto, H.L.M., Courboulay-II-4439.

**Thouars** (Deux-Sèvres) D: F-ino Jeanne Vazon, instruistino, 9, rue Michelet.

**Germanujo**

**Bisum** (Schleswig-Holstein) D: vakas. FD (pedagogio): vakas.

**Dobrock-Wingst** (Niedersachsen) D: vakas.

**Elze/Han** (Niedersachsen) D: S-ro Joachim Glessner, fervoja oficisto, Bahnhof.

**Neustadt-Weinstr.** (Rheinpfalz) D: S-ro Erasmus Zilles, komer-cisto, Hauptstrasse 39/41.

**Uetersen** (Schleswig-Holstein) D: S-ro Richard Pritze, instruisto de gim-nazio, Eisinger Steinweg 76.

**FD** (pedagogio): La D.

**Kopavogur** D: S-ro Baldur Ragnarsson, instruisto, Alfhöfsvogur 42.

**FD** (literaturo): La D.

**Sassari** (Sardegna) FD (instruado): vakas.

**Mismar Hasiv'a** FD (veĝetarismo): vakas.

**Qiryal Mozkin** (Emek Zevulun) FD (filatelo): S-ro Avri Salamon, libro-tenisto, P.O.B. 8.

**Jugoslavio**

**Zrenjanin** (Vojvodina) FD (instruado): vakas.

**Kameruno**

**Fombot** D: S-ino Suzanne Eymyn, plantistino, B.P. 6.

**Nederlando**

**Arnhem** (Gelderland) FD (ŝufarado-komercio): vakas.

**Hilversum** (Noord-Holland) D: vakas.

**Pollando**

**Warszawa** FD (vojtoj): S-ro Mirosław Kossakowski, inĝeniero, ul. Wandy 9 m. 34.

**Svedujo**

**Halmstad** (Halland) FD (oficistaj ate-roj): vakas.

**Linköping** (Östergötland) FD (elektra instalado): vakas.

**Södertälje** (Södermanland) VD: vakas.

**Usono**

**Tampa** (Florida) D: vakas.

**NOVA DUMVIVA MEMBRO**

Otto, S-ro C. Stanley, West Orange, Usono.

En la printempo 1960 aperos belega

# Memorlibro

pri la

*Zamenhof - Jaro*

Ĝi enhavos la plej valoran materialon publikigitan okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

Oni trovos la nomojn: **Auld, Boulton, Collinson, Canuto, Fighiera, Francis, Isbrucker-Dirksen, Lapenna, Makkink, Nishi, Privat, Setälä, Waringhien** kaj multajn aliajn sub elstaraj artikoloj.

Ilustrita per riĉa fotomaterialo el la vivo de Zamenhof.

Elegante bindita.

**MENDU ĜIN JAM NUN ĈE U.E.A.!!**

Antaŭmenda prezo validonta ĝis la 1-a de februaro 1960: 9.— gld. 36 steloj.

## la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de  
**Prof. G. Waringhien**

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj  
aperas ĉiun duan monaton  
32/40 paĝa - - poŝtformato jare fr. fr. 400.- aŭ  
egalvaloro

Ricevas la abonojn:

**En Francujo:** R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98  
Marseille

**Alilande:** Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj  
de UEA

**PETU SENPAGAN SPECIMENON**

Redakcio:  
7. Av. Léon-Gourdault  
Choisy-le Roi (Seine) Francujo.

Administracio:  
5. Bd. Stalingrad  
Nice (A-M)

**Alproksimiĝas la monato de la DONACOJ!**

**Kion vi donacu?**

**Kion oni donacu al vi?**

ĈU VI DEZIRAS  
HELPI NIAJN  
OFICEJAJN LABOROJN? \*

## Frue pagu vian kotizon 1960!

ĈU VI DEZIRAS HELPI U.E.A.?

**FARIĜU MEMBRO-SUBTENANTO!**

DANKON

## Grupestroj!!

Bonvolu sendi al la Centra Oficejo de U.E.A. antaŭ la 1-a de decembro 1959 informojn pri nomo, adreso kaj kunvenhoroj de via grupo por la listo en Jarlibro 1960 (vidu p. 484 k.s. en Jarlibro 1959).

Prezo: unu dekonono de jarkotizo MA.

**VARBU REKLAMOJN  
POR JARLIBRO 1960!**

Partoprenu nian konkurson!

(Vidu dorsan flankon de la sept. no. de tiu ĉi revuo)

**POR LA DECEMBRAJ SOLENAĴOJ:**

**GRAVURBILDO DE ZAMENHOF,**

21 × 27 cm de Reto Rossetti, (vidu  
Dec. no. 1958) tre taŭga por klubejoj,  
kunvenejoj ktp. 0,75 gld.; 3 steloj

**FOTO DE ZAMENHOF,**

poŝtkarto 0,20 gld.; 0,80 steloj.  
Ĉion liveras la C.O. de U.E.A.

Ĉu interesas vin la folkloro de Nederlando?

Aĉetu la ĉarmegan libreton

## Sankta Nikolao en Nederlando

Bele ilustrita rakonto pri tiu granda festo de la bonkora sanktulo.

Prezo: 1,50 gld., 6 steloj.

# LIBROJN!

# Famo ne flugas, se kaŭzo ne estas!

Kvaropo  
La baptado de caro Vladimiro

Koko krias jam!

La infana raso

kvare titoloj de STAFFLO jam elcerpita!

Ankoraŭ haveblaj (sed de kelkaj nur ne multaj pecoj):

Reto Rossetti: El la maniko. 224 paĝoj

Marjorie Boulton: Kontraste. 288 paĝoj

Gaston Waringhien: Eseoj I. Beletro. 246 paĝoj

En traduko de

K. Kalocsay kaj G. Waringhien:

La floroj de l' malbono (Ch. Baudelaire) 400 paĝoj

J. D. Applebaum: Jozefo. 120 paĝoj

Paul Neergaard: La vivo de la plantoj. 128 paĝoj

Julio Baghy: Sonĝe sub pomarbo. 232 paĝoj

William Auld (Redaktinto): Esperanta Antologio. Poemoj 1887—1957. 648 paĝoj

Marjorie Boulton: Eroj kaj aliaj poemoj. 368 paĝoj

Gaston Waringhien: Lingvo kaj Vivo. Esperantologiaj eseoj. 452 paĝoj

Lastaj titoloj:

Tibor Sekelj: Nepalo malfermas la pardonon. C. 300 paĝoj

Leander Tell: La bela subtera mondo. C. 150 paĝoj

Baldur Ragnarsson: Stupoj sen nomo. C. 120 paĝoj

Reto Rossetti: Pinta kraĵono. C. 120 paĝoj

Aliaj titoloj baldaŭ anoncotaj!

Al saĝulo sufiĉas aludo!

La librojn liveras la eldonisto, UEA kaj ĉiuj libro-servoj de la Movado

KUNNHELPU PLUPORTI LA TORĈON!

Libro, kiun  
devas havigi  
ĉiu esperantisto

# Retoriko



KUN APARTA KONSIDERO AL ESPERANTLINGVA PAROLARTO

DUA ELDONO

DU PARTOJ: I. LINGVO — II. RETORIKO

Verkita originale en la Internacia Lingvo de Prof. D-ro Ivo Lapenna

"En ne multaj naciaj literaturoj estas trovebla libro tiel science redaktita, tiel oportune utiligebla, tiel pense riĉiga, kiel ĉi tiu verko". Prof. G. Waringhien en la Antaŭparolo al la Dua Eldono, Rotterdam, 1958.

### Pri la aŭtoro:

"Kiu aŭdacas eldoni fakan verkon, devas esti spertulo en tiu fako. D-ro Ivo Lapenna estas majstro en la parolarto; ĉiu kiu aŭdis lin paroladi, ĉu antaŭ grava kongreso aŭ en intima rondo, ĉu pri serioza scienca temo aŭ pri bagatela subjekto, lasis sin logi de tiu sonora kaj simpatia voĉo, kiu kondukas la aŭdantaron per koncizaj argumentoj al klara konkludo". "Dia Regno", n-ro 3/1959.

"Traleginte la tutan libron, ĉiu plene konvinkiĝos pri tio, ke la mondfama elokventa oratoreco de Ivo Lapenna estas nutrita ne nur per lia genio de la naturo donacita, sed ankaŭ per lia profunda kono pri retorikaj principoj kaj reguloj kaj multaj lingvistikaj fakoj. Li plie posedas la lingvon en mirinde alta grado: la esprimo de pensoj estas plue libera, dum la elekto de vortoj — precize adekvata. Lia stilo estas elegante simpla". "Oomoto", n-ro 1-2/1959.

"Majstra oratoro majstre skribas ne nur pri la retoriko mem, sed pri fakoj lingvistikaj. Ĉi tiu literatura trezoro enhavas la antaŭparolon al la Unua Eldono de Reto Rossetti, kune kun nova Antaŭparolo de G. Waringhien". "New Zealand Esperantist", Nov.-Dec./1958.

Por kompreni pli bone la esencon de la lingvo kaj la arton argumenti por justa afero:

Por lertaj esperantistoj dezirantaj ĝui elegantan, vere internacian stilon:

Por komencantoj strebantaj altigi sian lingvonivelon:  
Por superaj kursoj kaj studrondoj, por seminarioj kaj prelegoj:

Por donacoj al geamikoj kaj al laborantoj por la Internacia Lingvo, precipe en landoj, el kiuj ĝi ne estas mendebla:

"Kun grandega ĝojo kaj emocio ni foliumadis vian belegforman kaj tre valoran verkon. Mi nun ankoraŭ ne povas imagi kiom ĝi signifos por mia lingva evoluo. La grupo treege ĝojas pro via verko kaj je ĉiu kunveno ni legas ĝin komune kaj poste la legita parto estas preparolata..." el letero de la Esperanto-Grupo en Pápa, Hungarujo. "Mi ne nur tralegis, sed efektive bone studis kiel abocion vian instruplenan libron — Retoriko — kio tre utilas al mi en mia ofta laboro same tiel por Esperanto (ĉefe), kiel ankaŭ en mia ofico" (el letero de A. P. D. Taškent, Mezazio). "Mi legas vian libron kaj ne povas ne esprimi al vi mian dankon pro la sentoj, kiujn kaŭzas la legado. Tio estas mirinda.

### Pri la Unua Parto (Lingvo):

"El ĉi tiu parto oni povas ĉerpi bonegan materialon por nacilingvaj broŝuroj pri la Internacia Lingvo eldonotaj okaze de la Zamenhof-Jaro; precipe el la jenaj partoj: pp. 59-71, 83-90, 100-110. La aŭtoro lerte frakasas multajn pseudosciencajn stultajojn, kiujn laikoj kaj lingvistoj kutimis kaj ankoraŭ kutimas elbuŝigi kaj surpaperigi kvazaŭ argumentojn kontraŭ la Lingvo Internacia". D-ro W. P. Roelofs en "Scienca Revuo", n-ro 2-3/1959.

"Resume, trastudinte la Unuan Parton, ĉiu esperantisto sentas sin prava kaj forta kiel batalanto por nia afero. Tial mi rekomendas ĝin kiel studlibron al ĉiu esperantisto, precipe al nia juna generacio". P. Zlatnar en "Jugoslavia Esperantisto", Nov.-Dec. 1958.

### Pri la Dua Parto (Retoriko):

"La Dua Parto estas dediĉita al retoriko kaj kiu povas pli bone verki pri ĉi tiu arto ol la majstro inter la oratoroj? La aŭtoro ĝisfunde pritraktas ĉi tiun temon atentigante pri la plej simplaj faktoj, kiuj povas influi la esprimkapablon kaj la rilatojn inter la publiko kaj la parolanto". F.W. en "Nederlanda Esperantisto".

**Retoriko**  
**Retoriko**  
**Retoriko**  
**Retoriko**  
**Retoriko**

Mi neniam sentis ion similan pli frue..." (el letero de V.Z., studento en la Universitato de Moskvo).

### Por ĉiu esperantisto: RETORIKO!

La Dua Eldono estas reverkita kaj kompletigita. Sed, kion fari, se oni jam posedas la unuan eldonon? "Facile: oni donacas tiun al la loka Biblioteko kaj aĉetas la novan".

D. B. Gregor en "The British Esperantist"

Prezo: 11.- gld., 44 steloj bindita; 9.- gld., 36 steloj broŝurita.

Mendu ĉe U.E.A. aŭ ĉe la aŭtoro.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterda